


Revuo
ESPERANTO
Internacia

N-RO 547 (6) JUNIO 1951



Chateau Yquem (*vidu p. 167*)

44a Jaro

Junio 1951

Ĉion pri administrado de UEA kaj de la revuo ESPERANTO, abonado, reklamoj, anoncetoj sendu al

N-ro 547 (6)

Universala Esperanto-Asocio

Fondinto : H. HODLER

Redaktoro : HANS JAKOB

Helpredaktoro : MASON STUTTARD

Ĉion por la redakcio sendu al ESPERANTO

Palais Wilson, Genève, Svis.

Traduko kaj represo de artikoloj estas permesataj, kondiĉe ke oni citu la fonton. Oni sendu tian represaĵon al nia redakcio.

UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO

Heronsgate, Rickmansworth, Herts., Anglujo

Jara abono : 8 ŝil. anglaj (kun membreco kaj jarlibro 12ŝ. 6p.)

Ĉefdelegitoj kaj Perantoj en multaj landoj

Tarifo por reklamoj :

1 paĝo £6

1/2 paĝo £3

1/4 paĝo 30 ŝil.

1/8 paĝo 15 ŝil.

Anoncetoj pri korespondado :

2 pencoj por unu vorto aŭ 1 int. respond-kupono por ĉiu duo da vortoj

Legantoj en 74 landoj

Eldonnumero 6500

Enhavo

Specialaj artikoloj :	paĝo
Ideologio de la neŭtrala E.-movado : H.J.	161
Pretigu vin ! (poemo) : K. Vanselow ..	162
La vinoj de Bordeaux : P. Marly ..	167
Bilderoj el kvar landoj : I. Lapenna ..	171
Internacia Junular-kunveno postkongresa	184
Antaŭkongreso en Konstanz	185
Haarlem : T.J.O.	189
Konstantaj rubrikoj :	
Niaj kunlaborantoj : J. Guillaume	162
Tra la Mondo Esperantista	163
Monata letero : <i>Budapest</i> : P. Balkányi	170
Vivo Virina	175
Tra la Libraro : <i>Historio de Yukawa Teorio</i> (Prof. F. J. Belinfante); <i>Miru, Pensu, Ridu</i> (W. J. Nesbit) ; <i>Kredu min, Sinjorino</i> (M.S.) ; <i>123</i> (E. Revill)	176
Enigma Konkurso N-ro 59	179
Nia Forumo : <i>Pri modernaj literonomoj</i> ; “ <i>sin portis</i> ”	181
Por via distro : Kio estas via V.-K. ?	182
Esperanto kaj Radio	183
U.K.	184
Felietono	186
Oficiala Informilo	191
Esperantista Vivo	192
Internacia Konkurso	192

Revuo

ESPERANTO

Internacia

N-ro 547 (6)

Junio 1951



La ideologio de la neŭtrala Esperanto-movado

KREINTE sian lingvon, D-ro Zamenhof sin inspiris de humaneca ideo kaj la rezulto de lia penado — Esperanto — devis plenumi laŭ li esence homaman rolon. La simplecon de la lingvo li kompletigis per la simpleco de lia postulo: Estu fratoj! El tio ĉi naskiĝis la “interna ideo”, gvidilo de la ideo Esperantisto. Citata multfoje de anoj kaj de kontraŭuloj, la interna ideo neniam trovis klariganton precizan de ĝia enhavo. Kiel ĉiu sentimenta esprimo ĝi rifuzas precizan difinon.

La nuntempo abunde uzas la vorton “ideologio” t.e. instruo pri la ideo. Tiu ĉi lasta vorto signifas origine “formo”. Interesas nin scii en kio konsistas la ideologio de la Esperantomovado, pli precize, de la neŭtrala, senpolitika trunko. Nia ĝenerala celo estas doni al la homaro instrumenton de tuja lingva interkompreniĝo. Aparte de tio ĉi ni *esperas* ke la facila kontakto de homo al homo faciligas ankaŭ la idean interkompreniĝon. Por atingi tiun ĉi ŝtupon de sinkompreno lingva, necesas ja klopodi: lerni la lingvon. La dua klopodo estas akiri gradon de homa perfekteco, kiun proklamis Kristo: Amu unu la alian, amu eĉ vian malamikon! Ideala stato kiun

atingas ja nur malmultaj; la taga batalo por la vivo estas pli forta kaj la homa instinkto pli facile sekvas la malon de tiu ĉi grandioza postulo.

Konkrete: En kio konsistas do proksimume nia ideologio (instruo pri nia ideo)? Gvidas nin la ideo *servi* al ĉiuj homoj de bona volo, se ni laboras por la enkonduko de supernacia lingvo. Esperantisto, laŭ la percepto de D-ro Zamenhof, ne opinias, ke la nacio al kiu li apartenas, estas “elektita”, destinita eventuale por esti mastro de la ceteraj. La postulo “respekti kaj ami” aliulon entenas en si mem la postulon de la toleremo de aliula opinio aŭ kredo. Aplikante ĉion tion, pli malpli kaj ĉiam dependa de cirkonstancoj kaj kondiĉoj, la Esperanto-movado proklamis kiel fundamentan principon: la neŭtralecon en politikaj, rasaj kaj religiaj aferoj. Ĝi akceptas la mondon tia, kia ĝi estas, neniel enmiksas sin en la internan vivon nacian. Tio rezultigas de si mem alian sintenon, nome la neperforton. Ni volas realigi nian postulon per la povo de la parolo, per la konvinkigo de la skeptika mondo. Nia pruvilo estas la lingvo funkcia, la ekzisto de “popolo” kiu akceptas la ĵus skizitan ideologion. Universala la lingvo, kaj universala nia ideologio.

H.J.

Niaj Kunlaborantoj

Jean Guillaume, Ĉefdelegito en Francujo

INTER la ĉefdelegitoj de U.E.A. verŝajne ne troviĝas homo, kiu pli kunigas en si ĉiujn necesajn kvalitojn de landa reprezentanto, ol tiu, kiu hodiaŭ staras sub nia lupeo, Jean Guillaume.

Okupante gravan komercan postenon en sia lando, li scias atenti la organizan rutinon de administracio, sed samtempe per siaj simpatia maniero kaj persona ĉarmo disponas pri tiu neofta talento akiri—kaj des pli grave, konservi—grandan aron da amikoj en ĉiaj sferoj. Por la tasko plenumi funkcion, kiu postulas delikatan diplomation, necesas prudento, pacienco kaj, antaŭ ĉio, bonhumoro. Jean Guillaume posedas tiujn kvalitojn je granda mezuro, kaj certe estas unu el la plej popularaj kunlaborantoj en la franca movado.

Naskiĝinte en Le Havre en 1904, li estas speco de denaska Esperantisto, ĉar lia patro estis samideano. Li tamen “oficiale” lernis la lingvon sub gvido de S-ro E. Gasse, kies memoro estas eterniginda pro lia propono de la verda stelo en la unua kongreso en Bulonjo-sur-Mar.

Laŭprofesie, S-ro Guillaume estas inĝeniero kun titolo “Teknika direktoro de laboratorio”.

Jam de 1938 S-ro Guillaume estas reprezentanto de I.E.L./U.E.A. kaj eŭfemisme diras, ke la rolo estas simpla, kvankam li fakte peradis multe da servoj kaj komisioj aldone al la jam menciita rutinaĵo.

Kiel multaj el niaj fervoruloj donantaj sendomaĝe siajn energion kaj tempon por *la afero*, S-ro



Guillaume ĝuas la apogon kaj helpon de samideanino en la persono de S-ino Guillaume, kiu estas filino de Ges. Isbrucker en Hago, konataj tra la tuta Esperantista mondo. Ges. Guillaume havas tri junajn infanojn.
M.S.

Karl Vanselow :

Pretigu vin !

Invite nin vokas Munkeno,
Do ankaŭ por via prepar'
Por nia tutmonda kunveno
Pretigu vin, geamikar'.
Aperu el sudo kaj nordo,
El ĉiu direkto de l'ter',
Kaj uzu en paca konkordo
La lingvon de nia esper'.
Munkeno vin vokas invite,
Do aŭdu kaj ne restu for,
Aliĝu jam nun senhezite
Kaj helpu per kuna labor'.
Subtenu la pluan progreson
Kaj montru por tuta la ter'
La fortan kaj venkan sukceson
De nia beninda afer'.



Tra la Mondo Esperantista



Andoro

Nova vivo : En ĉi tiu malgranda landeto inter Francujo kaj Hispanujo reaperas signoj de Esperanta vivo. Sekve de laboro de S-ro J. Travesset Pijoan stariĝis kursoj en Sant Julia de Loria kaj en Les Escaldes. Montriĝis granda intereso pri Esperanto, kiu estis preskaŭ nekonata de la enlandanoj.

Argentino

Kongreso : Dum Pasko okazis en Necochea la 6-a Argentina Kongreso de Esperanto. Ekspozicio, afiŝoj, gazetartikoloj, surstrataj laŭtparoliloj atentigis al la publiko la aferon Esperantan. La Urbestro S-ro José Marchetti bonvenigis solene kaj Prof. E. Balech trafe parolis pri Esperanto. Okazis ekskurso al marbordaj grotoj, kaj unu vesperon S-ro Eugenio Iglesias prelegis pri U.E.A. kaj ĝiaj servoj. En laborkunsido oni elektis S-ron Iglesias prezidanto de la Ligo kun S-ro Floreal Villar, ĝenerala sekretario. Agrabla atmosfero kaj sukcesa renkontiĝo.

Aŭstrujo

Eminenta apogo por Esperanto : En letero al D-ro Adolf Halbedl, Universitata Profesoro D-ro Johannes Ude diris interalie : “ . . . neniuj ĝojus pli ol mi se komuna mondlingvo, ni diru Esperanto, fariĝus en ĉiuj internaciaj kongresoj debata lingvo. Tia klopodado meritas akceladon. Mi kiel homo kaj katolika

pastro devus honti, resti koncerne tian klopodadon indiferenta aŭ eĉ kontraŭa La latina lingvo, kiu nuntempe estas nia liturgia lingvo, neniam kapablos kaj ne estos popola lingvo, sed certe ĉiuj nacioj en la tuta mondo ĉie kapablos per unu bato unuece organizi la partoprenon en la liturgiaj festoj sur la bazo de komuna mondlingvo ”

Landa kongreso : Okazos en Innsbruck, Tirolo de 28 julio ĝis 2 aŭg. la Aŭstria Esperanto-Kongreso. Krom la laborkunsidoj okazos balo, ekskursoj, amuza vespero, vizito al teatro kaj adiaŭa vespero “Tirolo Salutas”. Informojn ĉe : Esperanto-Kongreso, “Adambräu”, Heiliggeist-Strasse 16, Innsbruck, Aŭstrujo.

Britujo

Filio de fervojistoj : Nun ekzistas en Britujo Asocio de Esperantistaj Fervojistoj, filiiĝinta al la I.F.E.F. La ĉefa celo de la fervojistoj unue estas establi kontaktojn kun samfakanoj. Enlandaj interesatoj kontaktu : S-ron C. S. Parry, 80 Sheringham Ave., Southgate, London, N.14.

Francujo

Kunveno de junularo : Por gejunuloj 15–19-jaraĝaj la franca instruista asocio G.E.E. aranĝas 18-tagan internacian migrantan kolonion de la 17-a julio ĝis 4-a aŭg. ĉe la marbordo kaj kvar insuloj inter Nantes kaj Bordeaux. Lokoj estas

rezervitaj por 20 Esperanto-**parolantaj** gesamideanoj. Inkluziva kosto estas 8.000 fr. fr. Urgas. Okazos krome vizito al Parizo 4–6 aŭg. Detala cirkulero havebla ĉe: F-ino J. Dedieu, 3 rue Arzac, Toulouse, Franc. (Memoru krome, ke F-ino Dedieu volonte donas informojn pri la Instruista Seminario en Supra Bavarujo 26.VII–4.VIII).

Germanujo

Sukcesoj en Bonn: La urba trafik-oficejo eldonis dupaĝan Esperantlingvan aldonon al la faldprospekto de la urbo Bonn. Interesatoj sin turnu kun petoj al: Stadtisches Verkehrsamt Bonn, Poststrasse 27/29, Bonn, Germ. Nepre skribu en Esperanto!

De Pasko ĉijare Esperanto estas instruata kiel deviga fako en la 5-a lernjaro en la popollernejo "St. Marien" en Bonn. Simile en la popolaltlernejo funkcias kurso de Esperanto.

Gvatemalo

Propagando: Sekve de la laboroj de Del. de U.E.A. S-ro D-ro Jules Bonge, aperis 20 artikoloj pri Esperanto en enlandaj gazetoj. Krom tio aperis favoraj mencioj en pluraj revuoj internaciaj vendataj en Gvatemalo. Antaŭ la alveno de S-ro Bonge neniam okazis radio-elsendo pri Esperanto en tiu lando. Post multaj klopodoj fine interesiĝis la direktoro de la oficiala stacio *Voz de Guatemala* kaj de aprilo 1949 S-ro Bonge regule parolas antaŭ la mikrofono en la fako kultura, entute pli ol 30 elsendoj en hispana lingvo pri Esperanto. Post multaj klopodoj diversaj kursoj efektiviĝis en la kadro de iuj lernejoj kaj precipe en la fakultato *Facultad de Humanidades*

en la universitato (nedevice), kaj en *Instituto América*. Plej lasta sukceso sur tiu tereno estas kurso en la *Escuela de Verano* (Somera Lernejo) de la "Universidad de San Carlos de Guatemala". Okazis cetere la unua ekspozicio de Esperanto en Centra Ameriko! Al nia pioniro direktiĝas la bondeziroj de ĉiuj samideanoj. Neniu povas sufiĉe taksi la laboron necesan sur tiel virga grundo.

Jugoslavujo

Tutlanda kongreso: Slovenia Esperanto-Ligo aranĝos 7–10 julio 1951 en Ljubljana la XV Jugoslavian Esperanto-Kongreson, kaj en la postkongresaj tagoj Internacian Somerrestadejon en la belaj turismaj lokoj de Slovenio: Bled, Bohinj, Groto de Postojna, kaj viziton al Adriatika Maro.

Invito! Slovenaj Esperantistoj invitas al partopreno en la aranĝoj por ekkoni ilian popolon, kaj proponas la jenajn kondiĉojn al eksterlandanoj: Al ĉiu interesato Slovenia Esperanto-Ligo prizorgos kaj pagos la restadon kaj vivadon kontraŭ garantio pri egaltempa gastigado de unu el iliaj Esperantistoj en via lando, aŭ kontraŭ sendo de diversaj Esperantaj libroj (ankaŭ pluraj ekzempleroj de unu verko). La vojaĝkostojn pagu la interesato mem. Detalan interkonsenton faru kun: Slovenia Esperanto-Ligo, Cankarjevo nabrežje 7/I, Ljubljana, Jugoslavujo. Detala ilustrita prospekto estas havebla ĉe la nomita instanco.

Kanariaj Insuloj

Nova kurso: Post longa silento kaŭzita de la ĉesigo de universitata Esperanto-kurso flanke de tiama ĵus enoficigita malprogresema rektoro—

pri kio ni siatempe informis niajn legantojn—ni nun povas komuniki, ke la 23-an de februaro komenciĝis nova Esperanto-kurso en la urbo La Laguna. Ĝi elvolviĝas en la biblioteka salono de la Real Sociedad Económica de Amigos del País de Tenerife. La statuto de la asocio ŝirmas la estigon de la kurso, kiun gvidas s-ano J. Régulo Pérez. Sukceson!

Pollando

Zamenhof-soleno : La 15 apr. 1951 okaze de la 34-a datreveno de la mortotago de la Majstro kunvenis ĉe lia tombo varsoviaj geesperantistoj. Post almeto de florkrono kun surskribo "Al kreinto de Esperanto—Pollanda Esperantistaro" parolis prezidanto de Asocio de Esperantistoj en Pollando, s-ano E. Bugajski. Sekvis Jan Zawada kaj fine D-ro Anton Czubrynski. La soleno finiĝis per kantado de *La Espero*.

En la sama tago kelkdekpersona grupo da gejunuloj marŝis vespere tra la urbeto Duszyni (iama Reinherz) kun brulantaj torĉoj por surmeti florkronon ĉe la Zamenhofa memorŝtono tie troviĝanta.

Propagando : Semajna gazeto *Przyjaciółka* (Amikino) kun eldonkvanto 1.844.000 kelkfoje aperigis anonceton pri korespondaj kursoj de Esperanto. Rezultis 1177 petleteroj en 1950 kaj en la nuna jaro 282. Sekvas kurson 308 personoj.

Ciklostile presita gazeto *Tra la mondo kaj literaturo* por kursanoj nun havas 329 abonantojn.

Lernolibro de Prof. Sygnarski eldonita post la milito en 5000 ekzempleroj tute elĉerpiĝis. Ciklostile presita lernolibro de Leo Turno disvendiĝis je 3000 ekzempleroj. Koresponda kurso laŭ *Petro* foruzis

1000 ekz. Nun sentiĝas grandega manko de vortaroj kaj lernolibroj, nuntempe ne plu eldoneblaj.

Zamenhof-memorigaĵoj : Stratoj je nomo D-ro Zamenhof troviĝas nun en jenaj urboj : Warszawa, Łódź, Krakow, Białystok, Gdansk, Jelenia Góra, Wielun, Zamosc kaj Sródborow. Memortabulo en Łódź. Memorŝtonoj en Duszyni kaj Jelenia Góra.

Svislando

Ĝenerala kunveno : La ĉiujara ĝenerala kunveno de Svisa Esperanto-Societo okazis en Zürich 3–4 marto 1951. Ĉeestis delegitoj de 22 sekcioj kaj kelkaj izoluloj, krome reprezentantoj de Germana Esperanto-Asocio, I.K.U.E. kaj Gepatra Unuiĝo. La unua tago estis dediĉita al Esperanto-ekzamenoj sub prezido de D-ro M. Jaccard. Dum la amuza vespero ĉ. 100 personoj kunvenis. Dimanĉmatene oni traktis aferojn en kiu diversaj raportoj, budĝeto k.t.p. estis akceptataj. La kunveno konfirmis la prezidantecon de S-ro Laederach por 1951/2 kaj nomis sian ageman redaktoron de *Svisa Espero*—ĉefdelegiton de U.E.A. S-ro Otto Walder—honora membro. D-ro Edmond Privat raportis pri Tutmonda Kunveno de Popoloj en Genève. La kunveno aprobis fondon de Junulara Grupo de S.E.S.

Lausanne : Kun celo kunvenigi samideanojn de diversaj asocioj la Esperanto-grupo de Lausanne aranĝas renkontiĝon kun oficiala partopreno de S-ro A. Maret, Kantona Ŝtatestro, 19–22 julio 1951. Programo enhavas interkonan vesperon, prelegojn, fakkunvenojn, vizitadon en la urbo, tuttagan ekskurson. Loĝejoj je modestaj prezoj. Eblas tendumo.

Oni sin turnu al: S-ano P. Arbenz,
Rue Couchirard 8, Lausanne,
Svislando.

Kooperativismo

S-ro G. v. Heek en Hengelo, Nederl. sukcesis establi kontakton inter sia loka kooperativo kaj la sveda movado. La nederlanda organizaĵo presigis informojn pri la sveda kooperativa movado en traduko de S-ro van Heek. Gratulon.

Esperanto ĉe Mondfederalistoj

Kongreso en Romo: La internacia kongreso por tutmonda federacio en Romo dum aprilo 1951 kunigis reprezentantojn de kvindeko da societoj kaj institucioj. Ĝin malfermis Lordo Boyd Orr, Nobelpremiito, kaj Grafo Sforza, itala ministro de eksterlandaj aferoj. La Universalan Ligon reprezentis S-ino Isbrucker kaj Prof. Privat, kiu prezidis la diskuton inter eŭropaj kaj tutmondaj federalistoj. La kultura komisiono rekomendis la instruon de Esperanto en unuagrada lernejoj kiel edukilo al homara sento.

Stenografio kaj Esperanto

La stenografia sekcio de Germana Esperanto-Asocio sciigas, ke jam en 1932 germana samideano skribis dum la U.K. en Parizo po 180 silaboj en minuto sub kontrolo de la Internacia Asocio de Esperantistaj Stenografistoj (vidu ankaŭ noton en jan. n-ro p. 4). La gazeto *Stolze-Schrey-Post* publikigas regule krom tekstoj en franca kaj angla lingvoj ankaŭ tekstojn en Esperanto. Tiuj tekstoj estas tradukitaj en stenografion.

Dum la U.K. en München oni aranĝos konkurson por ĉiuj sistemoj kun minimumo de po 60 silaboj en minuto.

Alvoko por la radio

La Esperanta Voĉo de *Ufficio Radiodiffusioni Per L'Esteri* (Via V. Veneto 56, Roma, Italujo) alvokas la helpon de spertaj Esperantistoj. Kun la aparta celo altiri la infanaron al aŭskultado ĝi invitas verkojn, historietojn, novelojn, fabelojn k.s. kies enhavo estas simpla kaj en facilkomprenebla lingvo. Prefere sendula manuskriptojn maŝinskribitaj (je 2 ekzempleroj) kaj zorgu ke la legado ne daŭru pli ol 18 minutojn. Klare skribu la nomon kaj adreson. Por pliaj informoj oni sin turnu al la ĉisupra adreso.

Junulgastejoj

Germana gazeto pri junulgastejoj volas ricevi raportojn de eksterlandaj junuloj pri migrado en Germanujo kaj pri vizito al germanaj junulgastejoj. Bonvenigos ankaŭ raportojn pri migrado en eksterlando kaj pri junulgastejoj eksterlandaj. Sendu al: Esperanto-Centro, Engelbertstr. 7, München-Pasing, Germ.

INTERNACIA FERIO - SEMAJNO

kun perfektigaj kursoj (T. Morariu) okazos kiel Antaŭkongreso 28.VII-4.VIII 1951
en KONSTANZ
(suda Germanujo).

Ekskursoj al Svislando kaj Aŭstrujo

Partoprennombro limigita je
200 personoj.

Petu la ilustritan invitilon de
IFS Esperanto, Grüngang 2,
Konstanz, Germanujo

P. Marly :

La Vinoj de Bordeaux

MALNOVA proverbo diras, ke manĝo sen vino estas kiel tago sen suno. Feliĉa do estas Francujo, kie la favora klimato kaj la kvalito de la grundoj ebligas la produkton de vinoj senfine diversaj sekve de la diverso de la vitoj.* Francujo ne nur estas la lando produktanta la plej grandan kvanton da vino, sed ĝi produktas la plej grandan kvanton da bonaj vinoj.

Inter la francaj vitejoj tiuj de Bordeaux estas aparte rimarkindaj ĉar ili produktas pli ol la duonon de la francaj delikataj vinoj. La vito estas kultivata en la Bordeaux-a regiono jam de la plej antikvaj historiaj tempoj. Pluraj latinaj aŭtoroj parolis pri la vinoj de tiu landparto. En la mezepoko la anglaj reĝoj multon faris por pligrandigi la inklinon al la vinoj de Bordeaux. La

* vito = vinberplanto

reĝo Edvardo la Dua, por solenigi la festojn de sia kronado, ordonis sendi al Londono mil barelojn de tia vino. En la XVa jarcento la franca reĝo Ludoviko Xa helpis la komercon de la Bordeaux-aj vinoj kaj konfirmis la privilegion de la burĝoj de tiu urbo. Post la Napoleonaj militoj, danke al komercaj kontraktoj, la rikoltoj de Bordeaux estis ekspedataj en la tutan mondon kaj ĉie akiris la favoron de la aĉetantoj.

Tial ŝajnas al ni interese inviti la leganton trairi tiujn vitejojn, kies famaj nomoj estas konataj trans la francaj limoj.

Se ni alvenas per la mara vojo ni trovas unue la regionon *Médoc* inter la sablomontoj de la Gascogne-a Golfo kaj la larĝa Gironde. Tre malaltaj, sur serio de montetoj je malgrava deklivo, la vitejoj ondumas ĝis fino de la vido. Tiu landparto—



La vinberrikolto

kie troviĝas inter aliaj la komunumoj *Saint-Estephe, Pauillac, Saint-Julien, Margaux* — produktas grandajn vinojn, kiujn karakterizas rubena koloro, parfumo kaj eleganto.

Kontraŭ Médoc sur la orienta bordo de Gironde la regionoj *Blayais* kaj *Bourgeais* donas bonajn vinojn por la kutima trinkado.

La landparto *Graves*, tre vasta, de la limo de Médoc ĝis tiu de *Sauternes*, kuŝas—kiel indikas ĝia nomo—sur gruzaj grundoj malriĉaj, sed pro tio favoraj al la produkto de la delikataj vinoj priskribitaj de Rabelais “galants et voltigeant” (elegantaj kaj flirtantaj). La blankaj vinoj de Graves estas nedolĉaj aŭ duondolĉaj, bonrasaj kaj plenaj de *suko*. La ruĝaj —*kuzoj* de la Médoc-aj—prezentas plurajn altklasajn.

La kvalito de la *Cérons*-aj blankaj vinoj troviĝas inter tiuj de la nedolĉaj *Graves* kaj de la dolĉaj (likvorecaj) *Sauternes* kaj *Barsac*, kiujn ŝatas kompetentuloj en la tuta mondo.

La sekreto de la vinproduktado en *Sauternes* estas la maturiĝo, kiun okazigas bonfara fungo *Botrytis Cinerea*. Al ĝi tiu vino ŝuldas sian unikan specialan *sukon* kaj sian tiel ŝatatan aromon.

Ni transpasu la riveregon Garonne. *Sainte-Croix-du-Mont* kaj *Loupiac* praktikas la samajn metodojn de kulturo kaj vinproduktado kiel *Sauternes*. Tre ŝatataj estas boteloj de tiuj vinoj. Sur la sama bordo de Garonne, ne malproksime de la granda urbo, la *Premieres Côtes* (unuaj montetoj) de *Bordeaux* produktas estimatajn vinojn. Sur la dekstra bordo de la rivero Dordogne staras la roko *Saint-Emilion*, vera arkeologia juvelo. La vino portanta tiun nomon havas multe da forto kaj

belan malhelan koloron. Ĝi estas vere granda vino. Najbare de *Saint-Emilion*, *Pomerol* donas kompletajn vinojn, kiuj ĉarmas samtempe la nazon kaj la palaton.

Objekto de la konstantaj zorgoj de la produktantoj, la *Bordeaux*-aj vinoj estas dissendataj de gravaj firmoj kun jarcentaj tradicioj al ĉiuj punktoj de la tero. Ili estas unu el la trezoroj de Franclando.

* * *

La kvalito de vino dependas precipe de la klimato, de la situacio rilate al la suno, de la grundo kaj de la vitspecoj. Ĉiuj grandaj nomoj estas “kontrolataj,” kaj rajtas ilin porti nur vinoj produktitaj el specifaj vinberspecoj sur precize limigitaj grundoj en kondiĉoj tre ĝuste difinitaj.

La kultivo de la vito ne estas facila. Ĝi ne nur necesigas multe da plugado kaj sarkado sed la ĉirkaŭtranĉado (forigo de neutilaj branĉetoj), kiu devas okazi ĉiun vintron, postulas specialan kompetenton. Krome la lukto kontraŭ la insektoj kaj kriptogamaj malsanoj necesigas oftajn aspergojn je fluidaĵoj kaj pulvoroj.

La rikoltado estas por la bienposedanto grava afero. Unue ĉar li devas elekti la ĝustan daton. La plenmatureco estas nepre necesa por la kvalito, sed aliparte malfrueco povus okazigi perdon de multaj vinberoj. Due, ĉar li devas venigi specialan aron da laboristoj kaj plej ofte ilin nutri kaj loĝigi. La rikoltado—en la ĝusta senco de la vorto—estas farata de virinoj kaj genejunuloj, sed la transporto al la ĉaroj en grandaj korboj estas laboro de viroj.

La viniĝo (transformiĝo de la vinberoj en vinon) ankaŭ estas grava rilate al la kvalito. Ĝi postulas

multe da atento kaj zorgoj. Por la grandaj vinoj la fermentado okazas nur en lignaj kuvoj.

Por ĝuste ŝati la vinojn estas necese ilin gustumi en favoraj kondiĉoj kaj kun konvenaj manĝaĵoj. La ruĝajn oni devas trinki je la temperaturo de la manĝoĉambro ; la blankajn oni trinku tre malvarmaj, sed ne glaciaz. La vino estas pli ol agrabla trinkaĵo. Ĝian bonfaran efikon tro ofte nekonatan oni devas emfazi. Tion ni faras citante kelkajn frazojn de parolado de D-ro Girard, profesoro de la Fakultato de Medicino de Bordeaux :

“La vino ludas gravan rolon en la nutrado danke al siaj organikaj acidoj, taninaj materialoj, protoidoj, glucidoj, lipidoj, organikaj sukoj kaj diversaj mineraloj. Ĝi entenas fosforon, kalcion, magnezion, kloron, arsenon, feron, kupron, materialojn utilajn por la organismo dum ĝia disvolviĝo. Ĝi enhavas vitaminojn. La vino posedas radioaktivon, kiun oni povas mezuri, kaj kiun konservas la malnovaj vinoj. La vino estas kontraŭmikroba aganto ; ĝia efiko kontraŭ la tifa bacilo devas esti speciale menciata.”

Ĉio tio rezultas de laboroj de multaj eminentaj medicinistoj. Ni ne povas pli bone fini ol per la vortoj de la granda scienculo Pasteur : “La vino estas la plej saniga kaj higiena trinkaĵo.”

* * *

Ni deziras esprimi dankon al *Comité Interprofessionnel du Vin de Bordeaux* pro afabla disponigo de la fotoj en ĉi tiu artikolo kaj sur la fronto kovrilo.—
Red.



Malgraŭ la modernaj eltrovoj de la tekniko la homoj ankoraŭ kaj ĉiam sentas la junaĝan sorĉon de la trajno, preterbruanta kaj fajfanta kun longa blanka fumstrio ŝvebanta super la trako.

Freeman Wills Crofts, mond-fama verkisto kaj samideano, kondukas nin en la kulisojn de la fervoja administrado kaj konigas al ni amason da interesaj faktoj, kiuj pligrandigos nian ĝuon je venontaj trajnvojaĝoj. Tio estas la fono de la streĉa romano pri spionoj kaj sabotado kaj la taskoj de *Scotland Yard* en dum milita Britujo.

Lerte tradukita de
Mason Stuttard

MORTO DE TRAJNO

de Freeman Wills Crofts

devus nepre troviĝi sur via
librobreto.

256 paĝoj, bindita
Prezo 9 ŝil., aŭfranko 6p.

Eldonita de
The Esperanto Publishing Co. Ltd.

Mendu ĉe
Universala Esperanto-Asocio
Heronsgate, Rickmansworth,
Anglujo

aŭ ĉe enlanda libroservo

Monata letero

Budapest

Karaj gesamideanoj,

La sciigoj nun legeblaj en alilandaj gazetoj pri Hungarlando estas diversaj kaj kontraŭdiraj. Certe estas, ke tie okazis grandaj ŝanĝoj politikaj kaj ekonomiaj, kiuj forte efikis sur la kulturan vivon. Sen konsidero pri tio, ne eblas fari ian ajn raporton pri kulturaj aŭ artaj okazintaĵoj. Unu rezulto de tiuj ŝanĝoj kulturaj estas, ke oni atentigas kaj interesiĝas pri la soveta, rusa kaj aliaj orientpopolaj kulturoj. En teatroj, sur filmoj, en artekspozicioj, en muziksalonoj aperas nomoj antaŭe nekonataj, el popoloj kiuj mem estis nekonataj antaŭ la granda publiko — kun escepto de esperantistoj kaj tiuj, kiuj pli multe interesiĝas pri proksimorienta vivo. Gruzlando, Armenujo, Azerbajĝano, Turkmenio k.t.p. trovas lokon sur la programoj de la hungara ĉefurbo en la nuna tempo. Ekzemple ĵus okazis solena prezento de oratorio de la rusa komponisto Sostakoviĉ en la Muzikakademio de Budapest. La titolo estis *Kanto pri la arbaro*. Ankaŭ tiun ĉi grandan verkon oni ne povas priskribi sen kono pri la vivo kaj la influoj, inter kiuj ĝi naskiĝis.

Jam la devizo de la komponisto estas signifplena: “Mi devas serĉi kaj mi volas trovi la vojon al la koro de la popolo”. Certe multaj artverkistoj serĉas tiun vojon, sed ĉi tie la signifo estas, ke la verko ne estas nur “arto pro arto”, sed celkonscia. La gvida ideo estas la homa transformado de la naturo; la gigantaj planoj pri arbarkulturo sur la stepoj. Pri tiuj planoj jam aperis interesa artikolo en *Esperanto*. La oratorio redonas la zumegon de arbarega

branĉaro plantota de diligentaj homoj. La verko komence reprezentas la vivon de lando ruinigita de la milito, sed rekonstruata. Malhelaj tonoj memorigas la iaman caran tempon de servuteco kaj mizero. Trumpetsonoj! Venas junularo, pioniroj plantas la arbaron! Honormarŝo. Revanta melodio pri la estonteco. Fine, uzante rusan popolkanton, oni prezentas akordserion pri la gloro de la konstruado kaj la forto.

Se ni akceptas, ke ekzemple, Beethoven verkis grandegajn simfoni-ojn pri temoj tiutempe efikaj—pri bataloj, pri Napoleono, pri kunfandiĝo de la homaro—ni povas kompreni, ke komponistoj serĉante sur la vojo al la popolo, ĉerpas el ties laboro, vivo, planado kaj historio. La demando ĉiam estas, ĉu la popolo komprenos tion, kion la artisto volas diri, kaj ĉu la muziko estas ĝuebla kaj ŝatebla de tiuj vivantaj ekster la medio en kiu ĝi naskiĝis?

La kunigitaj ĥoroj de Budapeŝto, kiuj prezentis la verkon, forte impresis kaj entuziasmigis la ĉeestantaron. Certe iuj povis kaj povos aŭdi la verkon per la radio, kaj estus interese ricevi impresojn pri la efiko.

Samtempe oni prezentis verkon de hungara komponisto Ferenc Szabó *Ludas Matyi* (Ansera Maĉjo), kiu per melodioj de hungara popol- kaj danc-muziko prezentas la malnovan hungaran rakonton pri servuta vilaĝa knabo, kies anserojn perforte forprenas la fiero bienmastro, kiu anstataŭ pago, donas al la knabo bastonadon. La junulo per diversaj ruzoj trifoje redonas la bastonfrapon al la mastro. La saman rakonton oni prezentis jam antaŭ jaro kiel kolorfilmon.

Samideane via
Pál Balkányi.

Ivo Lapenna :

Bilderoj el kvar landoj

EN la sekvaj linioj ne troviĝos priskribo de la fieraj majestoj de antikva Romo, nek de ĝiaj luksaj modernaj palacoj. Mi ne parolos pri la sveltaj linioj de la Torinaj arkadoj, nek pri la leviĝanta industrio de Milano. Estus vanaj la provoj prezenti per vortoj la kolor-abundon de la Lazura Marbordo, kie la vintro karesas printempe, aŭ la glaciajn ventegojn de la Friza ebenaĵo, kie la suno brilas metale. Kaj kiel trovi adekvatajn esprimojn por elvoki vivecajn bildojn pri la nobla trankvilo de la mezepoka Bruĝo, pri la impona beleco de la gotikaj konstruaĵoj en Bruselo kaj Antverpeno, pri la ĉarmo de la Nederlandaj dometoj kun brilantaj fenestrovitroj—ĉiam puraj, ĉiam junece freŝaj ?!

Mi ankaŭ ne volas hodiaŭ skribi pri la loĝantoj, pri la diversaj ekonomiaj, sociaj, politikaj kaj kulturaj problemoj de tiuj kvar landoj. Ili ĉiuj havas unu komunan malfacilaĵon: eliri el la krizo—ekonomia, intelekta kaj morala—kaŭzita de la pasinta milito kaj de la danĝero de novaj komplikadoj. Ĉiu el ili havas ankoraŭ siajn specifajn problemojn: senlaborecon, harmonigon de la salajroj kaj prezoj, nacian aŭ religian demandojn. Kaj oni devas konfesi, ke ĉiu el ili kuraĝe, kvankam ne kun la sama sukceso, frontas la obstaklojn kaj klopodas trovi novajn vojojn. Pri tio, eble, alian fojon!

Hodiaŭ nur tri, kvar fotetoj pri la movado. Fotetoj plej karakterizaj, kaptitaj jen en unu, jen en alia loko. Eble eĉ ne fotetoj. Nur bilderoj. Sed bilderoj, kiuj povus esti utilaj

ankaŭ por la esperantistoj en aliaj urboj, en aliaj landoj !

* * *

Antaŭ ĉio estas necese akcenti, ke la geesperantistoj en ĉiuj vizititaj landoj preskaŭ 100%—tute egale al kiu grupo aŭ asocio ili apartenas organize—pensas kaj sentas home. Tio ne estas frazo. La eduka rolo de la Internacia Lingvo mem, de ĉiuj spiritaj manifestiĝoj kreitaj kaj kreataj en ĝi, estas vere impona. Kiam oni vizitas centojn da urboj, kiam oni kontaktas ĉiujn eblajn sociajn mediojn, tiam oni povas konstati kun senduba certeco, ke vere la uzado de la Internacia Lingvo ĉie—en ĉiuj regionoj kaj en ĉiuj socitavoloj—rompas la mallargajn naciajn kadrojn kaj malfermas la vojon al tutmonda konceptado. Tio kreas fortan solidarecon inter la praktikantoj de la lingvo. Sed tio ankaŭ formas favoran grundon por evoluigo de la homa individueco, surbaze de egaleco kaj libereco.

Centoj da ekzemploj estus citindaj. Unu sufiĉu. En Romo estas multaj bonaj esperantistoj. Karlo kaj Niĉjo Minnaja sendube troviĝas inter la plej bonaj. La unua havas dekunu jarojn, la dua dektri. Kun tiuj du infanoj oni povas konversacii tute libere pri multaj temoj. Karlo estas ankoraŭ tro juna. Sed Niĉjo—certe dotita de eksterordinara inteligenteco—vigle diskutas kun plenaĝuloj kaj lerte defendas sian starpunkton. La bonega kono de Esperanto donas al li la necesan certecon. La neŭtraleco de la lingva diskutfundamento altigas lin al nivelo de plenaĝulo ! Liberiĝi

de la lingva malfacilaĵo signifas ofte liberiĝi de komplekso de malplivaloro !

* * *

Flankenlasante tiun komunan econ, la diferencoj koncerne la nombron de la esperantistoj, organizitecon de la movado, ĝian kulturen nivelon, estas tre grandaj. Nur en Nederlando ekzistas vere amasa movado. Tie, en kvar landaj asocioj—neŭtrala, laborista, katolika kaj kristana—estas organizitaj preskaŭ 5.000 personoj. Ĉirkaŭ 50.000 Nederlandanoj scias pli aŭ malpli bone la lingvon ! Esperantistojn oni renkontas tute hazarde en vagonaro, poŝtoŭicejo, tramveturilo, surstrate Mi estis intervjuita de kvindek da ĵurnalistoj. Inter ili mi trovis nur tri, kiuj komprenis la francan lingvon. Nur unu parolis ĝin. Sed mi trovis 8 ĵurnalistojn, neorganizitajn, kiuj komprenis kaj eĉ parolis Esperanton. Mi aldonu, ke la francan lingvon oni instruas devige en la nederlandaj lernejoj, dum Esperanton oni povas lerni nur en la kursoj de niaj organizaĵoj !

Pri la itala movado oni povas diri, ke ĝi renaskiĝas. Niaj italaj ĝemikoj atingis atentindajn sukcesojn ĉe la radio. Ilia organo "L'Esperanto" fariĝas de numero al numero pli bona. La propaganda fako funkcias kontentige, kvankam oni ankoraŭ faras malgrandajn eraretojn, facile korekteblajn. Ĝia ĉefa malforto estas manko de organiziteco, troa individueco kaj neglektado—krom en Milano kaj parte en Torino—de la vivo de la grupoj. Kiam oni komprenos, ke ne sufiĉas nur fari propagandon kaj gvidi kursojn—ofte en privataj domoj—sed ankaŭ zorgi, ke la lernintoj restu esperantistoj, tiam la sukcesoj estos multe pli kontentigaj kaj pli daŭraj !

Kvankam la franca movado multe vigliĝis precipe en la lastaj du jaroj, tamen tio ne estas tre videbla en la regiono vizitita ĉijare. Espereble baldaŭ ekfunkcios veraj societoj almenaŭ en tiel gravaj centroj, kiel Marseille, Nice kaj Cannes, kie troviĝas favoraj antaŭkondiĉoj por tio.

Apartan artikolon meritis la belga movado. En la lasta tempo ĝi reekfloris. Rimarkinda estas la iompostioma penetrado en la mediojn de intelektuloj. Afero tre grava, precipe se oni konsideras, ke en la tuta okcidenteŭropa movado la nombro de intelektuloj estas proporcie tro malgranda. La renkontiĝo kun la plej konataj juristoj de Antverpeno en la hejmo de D-ro Roost kaj en la ĉeesto de nia vicprezidanto, D-ro Kempeneers, kaj la prezidanto de tiu bonega grupo, s-ro Jaumotte, estas vera modelo de tiaspecaj aranĝoj.

* * *

Se en iu loko la "afero ne marŝas bone", la esperantistoj kutimas kulpigi la "cirkonstancojn". Tiuj "cirkonstancoj", tamen, en la tute Okcidenta Eŭropo estas pli-malpli la samaj. Sekve ankaŭ la movado devus ĉie aspekti same bone aŭ malbone. Fakte, en Nederlando ĝi estas tre bona. Tiel bona, ke se ni povus atingi samajn rezultojn en ĉiuj aliaj landoj, la problemo de Internacia Lingvo estus ĝenerale solvita ne nur el pure lingva vidpunkto—kio jam okazis—sed ankaŭ el soci-politika vidpunkto. Signifas, do, ke la kompatindaj "cirkonstancoj" ne ĉiam kaj ne sole kulpas ! Cetere, se en Milano oni povas havi bonegan societon kun propraj ejo, biblioteko, legejo, kun regulaj kunvenoj kvar fojojn en la semajno, kun naŭ funkciaj kursoj k.t.p., ĉu oni ne povus la samon atingi almenaŭ

ankoraŭ en kelkaj italaj urboj ? Kaj ankaŭ en la urboj de aliaj landoj !

* * *

Estis bela januara tago. La suno plenigis la havenon. Ni—mia nova konato kaj mi—sidis en kafejo kaj agrable konversaciis. Li—bona, malnova esperantisto kaj persono, cetere, tre ĉarma—rakontadis longe kial li ne estas membro de U.E.A. : ĉar, unue, li ne havas sufiĉe da materiaj rimedoj kaj, due, ĉar li ne havas tempon por legi la revuon.

Pasis tiel ĉ. 2 horoj kaj intertempe li trinkis 4–5 aperitivojn. Fine mi kuraĝis rimarkigi, ke dum tiuj du horoj oni facile povus legi la tutan “Esperanto” (kune kun la anoncetoj) kaj ke per la prezo de la aperitivoj oni povus pagi preskaŭ la tutan jarkotizon de M.A., al U.E.A.

Ŝajnas, vere, ke ankaŭ tiu jam “fama” demando de kotizoj kaj abonoj estas problemo pli psikologia ol financa. En Nederlando la kotizoj *nur por la grupoj*—laboristaj kaj neŭtralaj—varias inter 25 kaj 35 cendojn semajne, do proksimume inter 1.300 kaj 1.800 francaj fr., aŭ inter 2.100 kaj 3.200 italaj liroj jare. Kaj mi garantias, ke la laboristo el Haarlem aŭ el Leiden ne estas pli bonstata, ol la meza esperantisto de kiu ajn alia lando en Okcidenta Eŭropo. Estas, eble, almenaŭ parte kaj ĝis certa grado, pli afero de estimo kaj respekto, kiujn oni havas por la lingvo ! Ankaŭ tiurilate la nederlandaj esperantistoj estas imitindaj !

* * *

En Nederlando ekzistas ne nur kvar landaj asocioj, sed ankaŭ preskaŭ en ĉiu urbo troviĝas kvar diversaj grupoj, kelkfoje eĉ kvin kaj pli. Ĉiu el tiuj grupoj laboras memstare en sia medio. Tio estas bona. Ankoraŭ pli

salutinda estas la fakto, ke kutime ili kunlaboras sur la ĝenerala kampo de la lingva disvastigo. Tiel okazis, ke la prelegojn en Nederlando ĉiam vizitis ĉiuj esperantistoj de la koncerna loko. La aranĝojn prezidis ne nur membroj de neŭtralaj grupoj, sed ankaŭ de laboristaj, katolikaj aŭ kristanaj. Gratulinda ekzemplo de toleremo kaj komprenemo !

* * *

El multaj personaj kontaktoj kun neesperantistoj, la plej profunda impres—krom la menciita renkontiĝo en Antverpeno—restis de la konversacio kun S-ino D-rino Verwey-Jonker, elstara persono en la intelektulaj medioj ne nur de Eindhoven, sed ankaŭ de la tuta Nederlando. Interalie ŝi diris : “Oni devas multe vojaĝi, oni devas viziti la aliajn landojn kaj tie resti longan tempon laborante en sia profesio aŭ fako por ekkoni la aliajn popolojn, por evoluigi la Eŭropan penson. Estas bedaŭrinde, ke la intelektuloj en Nederlando sentas sin tro bonaj konantoj de lingvoj por interesiĝi pri Esperanto. Mi opinias, ke precipe la junularo—ne nur la laborista, sed ankaŭ la studenta—devus ellerni Esperanton tiucele !”

* * *

Li ĉijara prelegvojaĝo estis multilate ankoraŭ pli bone organizita, ol la pasintjara. Skribante la suprajn liniojn, mi intence evitis la citadon de nomoj. Centoj da ge-esperantistoj kontribuis diversmaniere al ĝia sukcesigo kaj se oni mencias nur la plej aktivajn, unu tuta paĝo ne sufiĉus. La movado ŝuldas dankon al ili ĉiuj. Tamen, tute apartan dankon al vicprezidanto de U.E.A., D-ro Kempeneers, kiu konstante sekvis la evoluon de tiu granda

(daŭrigo sur p. 185)

V E N U A L B R I T U J O



B R I G H T O N

*Reĝino de Britaj
Banurboj*

Igu Brighton, Reĝinon de banurboj sur la suda marbordo de Britujo, via centro por la Festo de Britujo! Multaj bonaj hoteloj disponeblaj, konvenaj por ĉiaj monujoj. Je nur unuhora veturo de Londono, kaj funkcias preskaŭ 100 elektraĵ trajnoj ĉiutage. Ĝuu la festaĵojn de Brighton mem kaj inkluzivigu ankaŭ la Londonajn. Ĉiuj informoj de E. Browne, Royal York Buildings, Brighton.

NUR UNU HORON DE LONDONO



Vivo Virina

Gvidantino de ĉi tiu rubriko estas : S-ino R. M. Dhonau, Avondale, Cromer Road, SHERINGHAM, Norfolk, Anglujo, al kiu oni adresu ĉiujn korespondaĵojn pri *Vivo Virina*.

Kiu volas respondon, nepre sendu rpk. (Britoj pm.) por afranko.

Karaj gelegantoj,

Mi skribas ne nur al miaj "leg-antinoj" ĉar ankaŭ kelkaj sinjoroj skribis al mi pri *Vivo Virina*. Mi dankas vin ĉiujn pro la multaj leteroj kaj pro la granda intereso montrita. Mi tamen tre petas vin sendi al mi informojn el via lando, kun receptoj. Dankon.

R.M.D.

Libera tago en la monato por virinoj : En Ĉeĥoslovakujo kaj Aŭstrujo nuntempe leviĝas movadoj de la virinoj por ke ili ricevu ĉiumonate unu liberan (salajritan) tagon en kiu prizorgi siajn hejmajn laborojn. Ĉu tia unu libera tago por hejmaj taskoj estas kutima alilande? Se jes, kiaj estas pliaj kondiĉoj? Ni bonvenigos informojn por publikigo en nia rubriko.

Virina sekcio : El Germanujo mi ricevis informon pri la Virina Sekcio de la Germana Esp.-Asocio. Kompetente gvidas ĝin F-ino M. Vogel en Stuttgart, kiu ĉiumonate eldonas cirkuleron (haveblan ĉe G.E.A. kontraŭ rpk.) kiun mi varme rekomendas al ĉiuj, kiuj interesiĝas pri virinaj aferoj.


Zorgo pri la dentoj : Belaj dentoj estas gravaj por la sano, ne nur

aldono al la belo. Dentisto donis la jenajn konsilojn : 1. Vizitu dentiston du aŭ tri fojojn en jaro. 2. Aĉetu po du novaj dentbrosoj 4-foje en jaro. 3. Uzu unu broson por la vespero kaj la alian por la mateno. 4. Uzu dentsilkon por forigi pecojn restintajn inter la dentoj. 5. Uzu malvarman akvon por purigi la dentojn kaj buŝon. 6. Masaĝu la dentkarnon ĉiutage per la fingropintoj. 7. Manĝu multajn nekuiritajn legomojn, kiel ankaŭ fruktojn krudajn, oranĝsukon, limonojn (citronojn), kaj pampelmojn (angle : *grapefruit*, fr. *pamplemousse*). 8. Trinku multe da lakto kaj prenu oleon de morua hepato.

La recepto de la monato : *Italaj patkukoj :*

Ingrediencoj : 250 gr. da faruno, 3 ovoŭflavoj, iom da malgrande raspita citronŝelo, akvo, oleo, sukero.

Metodo : Metu la farunon en pelvon kun pinĉpreno da salo, kaj enmetu la ovoŭflavojn. Batu per ligna kulero kaj aldonu akvon, sed nur poiome ĝis oni havas malpezan bataĵon. Aldonu la citronŝelon. Lasu la bataĵon dum $\frac{1}{2}$ -horo. Poste faligu la miksaĵon en paton da bolanta oleo. Kuiru ĝis orbruna koloro, drenu kaj aspergu per sukero. Servu varmaj.



Tra la Libraro

Duope ricevitaĵn verkojn ni recenzas ;
unuope ricevas nur mencion.

*=akireblaj ĉe U.E.A.

***Historio de Yukawa Teorio** eld. de Esperanto-Rondo en Naturscienca Fakultato de Osaka Universitato, Osaka, Japanujo. Broŝ. 18×12.5cm., 26 p., prezo 1ŝil., afranko 2p. (5 rpk.).

Jen modesta sed grava apliko de Esperanto en la scienco. La enhavo de ĉi tiu libreto konsistas el tri partoj. La antaŭparolo klarigas kiel ĉi tiu libreto ekestis post kiam la japana fizikisto Yukawa ricevis la Nobel-premion por la fiziko. Sekvas artikolo kvarpaĝa de profesoro F. Egami de Nagoya Universitato pri "Scienco kaj Esperanto"—du elstaraj formoj de la plej karakterizaj ecoj de la homo, nome de liaj kapabloj uzi lingvojn kaj instrumentojn. La ceterajn 20 paĝojn plenigas artikolo pri "La Naskiĝo kaj Disvolviĝo de Yukawa Mezonteorio". Kvankam verkitá speciale por fizikistoj, ĉi tiu artikolo estas interesa kaj grandparte komprenebla ankaŭ por nefakuloj.

Klara historio de la moderna fiziko de elementaj korpuskloj formas la ĉefparton de ĉi tiu artikolo. Eksperimentoj kaj teorioj ambaŭ estas priskribitaj. Speciale interesa por laikoj estas la diskuto pri naskiĝo kaj ŝanĝiĝoj de elementaj korpuskloj. Sekvas priskribo pri la cirkonstancoj en kiuj Yukawa kreis sian teorion, kaj pri la organiziĝo de japana naturscienco ĝenerale.

La lingvo ĝenerale estas bona. Tamen troviĝas kelkaj eraroj kaj iuj neklaraĵoj en la teksto. En la historia parto, iom ĝenaj estas mispresoj de

datoj 1933 (anst. 1938) sur p. 14, kaj 1938 (anst. 1948) sur p. 18. Mi rimarkis kelkajn preserarojn kaj la formon *Neŭtona* anst. *Newtona*.

Entute jen estas interesa novaĵo en la Esperanta literaturo, rekomendebla al ĉiu kun intereso pri la moderna fiziko.

Prof. F. J. Belinfante.

***Miru, Pensu, Ridu !** elektita kaj prezentita de Paul Bennemann. Eld. Heroldo de Esperanto ; 21×15cm., 240 p. bind., prezo 11ŝil., afranko 9p.

Estas plezuro bonvenigi la unuajn postmilitajn librojn eldonitajn de *Heroldo de Esperanto* ; kaj la fakto, ke sur ĉi tiu troviĝas la nomo Paul Benneman pligrandigas nian intereson ĉar li estas unu el la pioniroj de nia literaturo.

En la Antaŭparolo mi trovis la vortojn : *Mi avertas, mi petas, mi petegas : Ne legu ĉi tiun libron laŭ liniilo ! Ne formanĝu ĝin kiel longan karoton ! Sed trafoliumu ĝin, haltu tie kaj tie, frandu tion kaj tion* Nu, kia sugesto al recenzisto ! Bonege, mi diris, tion mi ja faros ! Sed ĉu vi iam manĝis ĉe bufedo ? Oni ja deziras provi tion kaj tio aspektas tre bongusta kaj tio estas neordinara Fakte, kaj mi hontas konfesi ĝin, mi estas formanĝinta preskaŭ ĉion. Do mi pardonpetas de S-ro Bennemann pro tio, ke mi kvazaŭ ekglutis liajn frandaĵojn ; sed vere la kulpo estas lia, ĉar li estas tro bona kuiristo !

Jen la menuo : “el la historio ekde la plej antaŭa pasinta tempo ĝis la plej aktuala nuno ; ĝi gvidas tra la tuta mondo kaj ĝis la steloj, en la regnojn de la naturo kaj de la tekniko, en la sciencojn kaj la mirakloj de la lingvo. Ĝi prezentas ludojn kaj kaprompilojn, enigmojn, problemojn de multaj specoj—sed ĉion ĉi ne laŭ metoda ordo, sed intermiksita, kaj kun akcento sur tio, kio estas stranga kaj eksterordinara”

La verkon oni povas precipe rekomendi al la ĝenerala leganto, por kiu ĝi bonege taŭgos kiel “apudlita” libro ; al la progresinto, kiu trovos ĝin vera minejo de tiuj teknikaj vortoj, kiujn ĉiuj bezonas koni ; kaj al la kluboj, kiel fonton de amuzaĵoj, sciigoj kaj farindaĵoj, kaj cetere ĝi estas io, kio forigos la grumblojn de la atendanta unuaveninto.

Kompreneble la lingvo estas bona, kaj preseraroj preskaŭ mankas (Queen’s College, 31 ; New York, 44 ; Beautiful, 51 ; Leonardo, 104 ; Nia Patro, 219). La uzo de propraj nomoj iafoje ne estas tute konsekvenca, ekz-e : Demokritos 7, Demokrito 84 ; Beteigeuze 65, Betejgeŭzo 69 ; k.s. sed tio estas tre malfacila kaj ankoraŭ ne solvita problemo por internacia lingvo.

La ore stampita bindaĵo estas bela kaj forta ; la aranĝo, kvankam kunpremita por malaltigi la koston, estas klara kaj plaĉa. Kaj la enhavo ja igas nin miri, pensi kaj ridi.

W. J. Nesbitt.

***1.2.3.** Vilho Setälä kaj Elsi Borg ; Eldono V. Setälä. 23×16cm., 28 p. Kartonita, prezo 3ŝil., afranko 2p.

Ĉi tiu porinfana verko el Finnlando sendube troviĝos tre interesa kaj utila por ĉiuj (kaj gepatroj kaj instruistoj)

kiuj volas helpi al siaj tre junaj kompreni la kalkuladon. Ĝi estas iom neordinara en tio, ke ĝi enhavas (krom en la antaŭparolo) eĉ ne unu vorton—nur bildojn gaje kolorigitajn. La nacilingvan antaŭparolon oni anstataŭigis per Esperantlingva klarigo pri la celo kaj rekomendita uzmetodo.

Ĉar la antaŭparolo de libro estas tre ofte nesufiĉe atentata, estas domaĝe, ke en ĉi tiu okazo oni uzis tiel malgrandajn presliterojn por prezenti ĝin. En la paragrafo, kiu citas la sencon de kelkaj el la bildoj, ĉu ne estus pli helpe sugesti la nomojn de tiaj objektoj, kiaj *rulringo*, *ĵetkubo*, *keglo*, *skutilo*, anstataŭ de tiaj aferoj, kiaj *kato*, *mano*, *papilio*, *ansero*, *pomo* ? Kaj ĉu la trirada “puŝociklo” ne estas triciklo ?

La libro montras en laŭnombra progreso plej diversajn objektojn aranĝitajn laŭ la plej ofte trovataj grupiĝoj. Unu el la ĉefaj aferoj estas, ke la infanoj alkiutimiĝu al la aranĝoj por ke ili povu “instinkte” (?) rekoni la grupiĝojn kvazaŭ simbolojn, kiuj reprezentas specifajn nombrojn, sen la neceso kalkuli individue la erojn. La metodo estas bona, kvankam ĉiu plenkreskulo al kiu mi montris la pli grandajn konstelaciojn ŝajne ankoraŭ ne finedukiĝis en ĉi tiu fako de la kalkularto ! Entute la libro estas tre bona aldono al ekipaĵo de la patr(in)o aŭ juninfan-instruisto kaj ja meritas aĉeton.

Eric Revill.

*** KREDU MIN, SINJORINO !** originalo de Cezaro Rossetti ; eld. Teo Jung. 18.5×14cm., bindita, 260 p., prezo 11ŝ., afranko 6p.

Kun aproba antaŭparolo de Raymond Schwartz, kun multege da

anekdotoj pri vere amuzaj situacioj, kun trafaj vortbildoj pri scenoj ĉerpitaj rekte el la vivo (almenaŭ el unu tavolo de la vivo), ĉi tiu verko devus doni grandan kontenton al la Esperanta publiko. Mi efektive estas certa, ke granda nombro da homoj legos ĝin kun ĝuo. La aŭtoro disponas brilan kaj kolorplenan idiomon, konforman al la rakonta maniero konata ĉe eksponistoj, komercaj reprezentantoj kaj la tuta “genro” de homoj, kies materiala bonstato grandparte dependas de la parolpreto kaj la sprito.

Nenio simila al ĉi tiu verko antaŭe aperis en Esperanto. Per ĝi ni povas ekkoni la aventuran vivon de la “bazaruloj” kaj koniĝi kun la preskaŭ karikaturaj tipoj, kiuj facilanime sin movas sur la scenejon kaj post kelktempa ludo de sia rolo, rivela pri la plej diverse imageblaj psikoj, tiel same facilanime foriĝas en la neniecon, lasante kun la leganto fortan impreson pri efemero, nestabilo

Prezentante ĉi tiun verkon, la aŭtoro donis pli ol bildon pri la bazarula vivo kaj la spiritrompa penado vendi artiklojn ĉe pordoj kaj en foiroj. Lia rakonto elvokas bildojn el la grizaj tagoj de la intermilita tempo en Britujo, kaj legante “inter la linioj” oni povas percepti eĉ pli ol kion li malkovras pri la ĉagrenoj, la malespero kaj la termometraj varioj en la vivkondiĉoj de la popolo ĝenerale, kaj precipe de la homoj elektintaj panakiri per kurtaĝo.

Ĝenerale rekomendante la verkon pro ĝia “informa” valoro, mi tamen opinias konvene, menciigi la fakton, ke la aŭtoro—versajne strebante al realismo—enkondukis (erare miaopinie) kelkajn anekdotojn, kiuj povus ŝoki delikatan aŭ rafinitan naturon.

Ŝajnas al mi, ke ili odoras je “krudo pro krudo” kaj la verko gajnus per ilia foresto. Afero de gusto . . .

La ĝenerala impresio, kiun mi ricevis el la tralegado, estas sugestio de cinika materialismo en la sinteno de la eksponisto al la publiko. Tiu kvazaŭa malestimo de la bazarulo al la publiko fadenas tra la tuta verko tiel ke malgraŭ la sprito kaj la bonhumoro mi restis kun sento de melankolio. Al tio probable kontribuis ankaŭ la scio pri la subita morto de C. Rossetti en la pasinta jaro. Tiel talenta verkisto estus povinta pliriĉigi nian originalan literaturon, kaj lia forpaso estas efektiva perdo por la movado.

El pluraj lingvo-uzoj diskutindaj, mi volas tuŝeti nur unu “principan” formon — la uzon de *sen* antaŭ infinitivo. Tiu konstruo trafas favoron ĉe iuj samideanoj en la lastaj jaroj; sed mi ne povas ne senti, ke rezigno pri, ekzemple, *Nemoviĝante de la benko, li . . .* favore al *Sen moviĝi de la benko; li . . .* (p. 78) signas ankaŭ rezignon pri unu el la plej elegantaj konstruoj en la tuta lingvo.

Volumo bele produktita, preskaŭ sen preseraroj. M.S.

Ricevitaj : (Grave ! Petante, skribu nur Esperante) :

Bamberg : Turisma flugfolio en Esperanto. Petu de : Städt. Verkehrsamt, Bamberg, Rathaus, Germ.

Nürnberg : Ilustrita faldfolio kun urboplano, en Esperanto. Petu de : Verkehrsverein Nürnberg e.V. Lorenzer-strasse 31/III, Nürnberg, Germ.

Bratislava : Ilustrita faldfolio pri tiu urbo. Petu de : Slovakatour, Bratislava, Reduta, Ĉeĥoslovakujo.

Enigma Konkurso N-ro 59

Solvojn sendu al S-ro P. H. Mooy, rue Stuyvenbergh 28, Brussel II, Belgujo

Solvoj de la enigmoj en konkurso N-ro 57 :

N-ro 125 : Vidas okulo sed mano ne trafas. Ŝlosilvortoj : verdigro, inaŭguracio, ditirambo, arkipelago, skorzonero, obelisko, ksilofono, ultramaro, lunatiko, onobriko, sarkofago, ekskomuniki, dispepsio, metamorfozo, arbitraciulo, nominativo, omnibuso, numismatiko, epigrafo, tragikomedio, rosmareno, anomalio, faksimilo, anunaciacio, sentimentala.

N-ro 126 : Simile al ĉiu alia lingvo Esperanto devas esti rigardata kiel lingvo finita kaj netuŝebla.

N-ro 127 : Brakardokarotramo-dramulukoriperkaleŝ.

Gajnis la premiojn post kontrolo de la 55-a konkurso : Familio Anjer (Norv.) 154 p., S-ro D. A. W. Henskes (Ned.) 149 p., S-ro S. Roco Rodo (Hisp.) 149 p.

Enigmo N-ro 130 : akt - are - aro - ati - bur - eks - ele - elo - gio - igl - ink - ino - ito - klo - klo - ksa - kta - miĉ - nos - odo - ogn - ome - oro - oro - ort - oto - plu - pol - ram - red - spe - tal - tam - tri - tro - ult - vat - ven - ver. El la ĉi-supraj litergrupoj formu 13 naŭliterajn vortojn laŭ la ĉi-subaj klarigoj, kies unuaj literoj formas deziron. 1. kavaĵoj de kelkaj organoj; 2. diplomata fikcio; 3. vermformaj pastaĵoj; 4. farbo; 5. troprofiti el ies laboro; 6. interesa vidaĵo; 7. homc parolanta plurajn lingvojn; 8. levilo; 9. grava persono por revuo; 10. densecmezurilo; 11. melankolio; 12. muzikilo; 13. grekrite kristana. (Ensendis F-ino F. W. Boersma).

Enigmo N-ro 131 : 1. trilo, 2. linko 3. stabo, 4. liano, 5. parto, 6. klano,

7. stari, 8. opalo, 9. rondo, 10. glaso, 11. rusto, 12. festo, 13. stuko, 14. rosti, 15. besto, 16. risko, 17. basko, 18. krano, 19. virta, 20. korpo, 21. primo, 22. marto, 23. duelo, 24. vento, 25. heroo, 26. klavo, 27. konto, 28. stano, 29. ritmo, 30. kreto. Anstataŭigu en la ĉi-supraj vortoj unu literon per alia litero tiel ke el la novaj grupoj de kvin literoj vi povos formi vortojn laŭ la ĉi-subaj klarigoj. La novaj literoj tiam donas esprimon el la proverbaro de D-ro Zamenhof. 1. tabelo; 2. ĥemia elemento; 3. ornama nodo; 4. frukto; 5. metaforo; 6. rabobesto; 7. kuiri; 8. lumigilo; 9. parto; 10. korpoparto; 11. stelo; 12. ludkarto; 13. ligna ujo; 14. muzikilo; 15. maŝinkudri; 16. grajnaro; 17. defendilo; 18. ludkarto; 19. senŝulda; 20. legomo; 21. paperkvanto; 22. kapvesto; 23. tago; 24. nutraĵo; 25. korpoparto; 26. trinkaĵo; 27. fiŝo; 28. prepozicio; 29. monato; 30. klano.

Libroservo de U.E.A.

D. en Danlando demandis, ĉu ni povas peri abonon al la angla revuo *Reader's Digest*. Ni volas informi, ke ni povas peri tiun abonon por samideanoj ĉie, kun escepto de la nepagipovaj landoj kaj norda kaj suda Ameriko kaj usonaj teritorioj. La jara abonprezo estas 20 ang. ŝil. (£1). Mendu ĉe niaj agentoj aŭ senpere al : **Libroservo de U.E.A., Herons-gate, Rickmansworth, Herts., Anglujo.**



Nia Forumo

PAROLAS LA LEGANTOJ

Korespondantoj nepre esprimu sin koncize kaj mallonge. Antaŭ ol sendi leteron por publikigo, kontrolu la longon per komparo kun jam presita teksto.

Pri modernaj liternomoj

Kunvenis foje la estraro de fama internacia kompanio. Post legado de la jara raporto oni sciigis al la ĉeestantoj, ke jam en multaj landoj la akcioj bone vendiĝis, kaj ke sekve la dividendoj estas pli altaj ol iam antaŭe. Kontentigite la direktoraro sin apogis en la seĝoj por aŭskulti la konkludajn rimarkojn de la prezidanto. “Sinjoroj,” li diris kun evidenta ĉagreno, “ĉio ĉi staras tute bone en la praktiko, sed kiel ĝi funkcias teorie?”

Tiun saman ĉagrenon oni suspektas, legante la lastatempajn konsilojn de Prof. Waringhien pri la zamenhofaj liternomoj. Kiam nia lingvo estas jam pli kaj pli uzata, ne nur ĉe matematiko kaj kemio, sed en ĉiuj fakoj de la socia vivo—ni menciuj nur radion, telefonadon, aŭtomobilismon—kaj precipe de individuoj, kiuj sin trovas devigitaj uzi simbolojn origine sciencajn, li proponas alternativan nomaron, kiu, kvankam per ĝentila trompeto ĝi ŝajnas ne kontraŭi al la fundamenta, tamen preskaŭ neniel forigas ties malavantaĝojn.

Sed eviti ŝokon al la *Fundamento* oni apenaŭ povas, redifinante la intencojn de ĝia aŭtoro! Jen esence diras Prof. Waringhien; ke, se li estus pli bone pripensinta la aferon, Zamenhof allasus ankaŭ la adjektiv-

ajn finaĵojn ĉe liternomoj—kaj tuj li aldonas, en kiuj okazoj. Tio ja povas esti. Same diras la okcidentalistoj pri forigo de supersignoj. Sed laŭ la *Fundamento* la regulo staras tute nerebateble: *Nomoj de la literoj*: a, bo, co

Trankviliĝu: mi ne volas polemiki fundamentiste. Sed oni prefere neniel ŝoku, ol ŝoku ĝentile kaj tamen maltrafu sian celon. Sistemo ne kontraŭfundamenta, sed apudfundamenta, kaj necesas kaj tute decas. La principojn ni jam ĉiuj agnoskas ĉe granda klaso de modernaj radikoj.

Jen do niaj plej gravaj postuloj por tia sistemo.

1. Inkluzivo de la sono signita.
2. Akustika distingeblo. Tion Prof. Waringhien trafe akcentas, krom ke, laŭ la verŝajno, li malofte uzis telefonon, ĉe kio la problemo ĉefe gravas. “Mi volas VO prononci, sed VE mi elsuspiras”. Nur distingante per -a la voĉajn konsonantojn, ni ne atingas sufiĉan varion. Ekzemple la literoj fo, ŝo, so, co, estas inter la plej ofte konfuzataj en la tuta alfabeto. Do ni ne hontu uzi la tutan gamon de niaj vokaloj.

3. Gramatika flekseblo. Ideale oni povu montri facile ankaŭ la akuzativon kaj la pluralon, kiel en plej multaj naciaj lingvoj. Solvo: la literoj estu per si mem sendifinaj tamen substantivecaj, kaj povu al si

alpreni gramatikajn finaĵojn. (Kp. Hodiaŭ estas la deka de februaro; profitu la hodiaŭon.)

4. Evito de homonimoj. Malgraŭ frando al vortludoj oni skrupulu almenaŭ pri la ridindaj karamboloj, ekzemple: eta, kapa, pio.

5. Facila deklamado de la entuta listo. Ĉe naciaj alfabetoj tiu konsidero verŝajne pli ol ĉiu alia influis la finan evoluon de la literonomoj.

6. Laborŝparo ĉe la lernado.

Notu ankaŭ, ke

7. La supersignitaj literoj, pri kies uzo ankoraŭ malsamas la kutimoj (ilia uzo ĉe certaj fakoj de la matematiko verŝajne kaŭzus embarason) vidigas propran vokalgamon: ĉa, ĝe, iĥ, oĵ, ŝu—kaj povas esti ekskluzivitaj sen difekto al la ceteraj.

Al ĉiu litero de la supra listo oni povas laŭoportune aldoni gramatikajn finaĵojn.

La latinaj kromliteroj: ku (kuo), vudu (t.e. du vuoj—forme *vuduo*), iks (ikso) kaj igreko. Al mi tro subtila ŝajnas la distingo inter greka ipsilono kaj latina—tamen 'igreka'-ipsilono; la du nomoj estas esence identaj.

Al la greka literaro mi destinis substantivan rolon. Notu, ke sep el ili rekte derivigas la esperantajn nomojn: zed', jod', iks', rod', if', iĥ'.

alfo, beto, gamo, delto, epsilono, zedo, edo, dedo, jodo, kapo, labdo, muo, nuo, ikso, omikrono, ipo, rodo, sigmo, taŭo, upsilono, ifo, iĥo, ipso, omego.

Nun kritiku laŭvole! Sed pri viaj plibonigoj unue konstatu en jenaj—kaj similaj—kuntekstoj: Estas du ĝeoj en 'kuraĝiĝis'; punkti siajn jodojn; imoj kaj naoj (presistaj

mezurunuoj en kelkaj landoj); esforma vojo; taŭ-liniilo; montri la vu-signon!

La literoj signas al ni ja tre gravajn konceptojn. Eĉ, kiel en la ekzemplo, kiun supre mi citis iom malrespekte, oni uzis ilin kiel elvokantajn bildojn en la poezio. Estontece ili ĝuu en la lingvo la rolon de memstaraj vortoj, kiun ili meritas.

A. D. Foote.

“Sin portis”

Oni vidas ofte, speciale en recenzoj, kritikon pri esprimoj aŭ vortoj, kiuj ne estas vere eraraj nek malklare kompreneblaj, nur ne harmonias kun la gusto de la kritikanto. Pro kio tamen ne toleri diversecon de stilo, kiu tute ne kongruas al la mia? Jen penso, kiu kaptis min legante sur p. 49 en *Esperanto* tion, kion diras S-ro E. Dahlmann pri la esprimoj “sin portis”, kaj “sinokupis”, “sinĵetis”.

Se ni legas en la Zamenhofa traduko de la Biblio, ni trovas en la unua teksto presita en Parizo en la jaro 1911, *Genezo* ĉap. 1 v. 2: “... kaj la spirito de Dio sin portis super la akvo.” En la definitiva eldono, presita en Londono 1926, post la revizio de la Zamenhofa manuskripto fare de komisiono, la sama frazo tekstas jene: “... kaj la spirito de Dio ŝvebis super la akvo.” Nu, kiujn pripensojn povus elvoki la citita fakto?

Paul Nylén.

ATENTU! Tuj antaŭ, tuj post kaj dum la Kongreso en Munkeno la Sekretario estos for de la Centra Oficejo. **Bonvolu ne skribi al Rickmansworth dum tiu periodo. Dankon.**

Por via distro



Sendu vian plej amuzan anekdoton al M. Otiel, ĉe U.E.A.,
Heronsgate, Rickmansworth, Herts., Anglujo. Antaŭdankon

???

Kolera viro : Sinjoro, ĉu estas vere, ke vi amas mian edzinon ?

Sinjoro : Jes, tute vere ; kaj ankaŭ ŝi min !

Kolera viro : Temas nur pri mia edzino. Mi ne interesiĝas pri viaj fiĉininoj !

Ankoraŭ la skotoj !

Germano en poŝtoŝtanco en Skotlando miris je la longa vico. Scivolema, li demandis : “Ĉu vi skotoj estas tiel ŝparemaj ke vi metas ĉiun pencon en la bankkonton ?” La skoto respondis : “Ah, ni venas ĉi tien nur por plenigi la fontplumon !”

G.F.M.

Maljuna oni iĝas forgesema. Oni eĉ forgesas, ke iam oni mem estis juna.

* * *

Verajn amikojn akiras nur tiu, kiu pli bone aŭskultas, ol rakontas.

* * *

Plej grava en la vivo ? Ne rigardi sin, kiel gravan.

Ambicio

La profesoro : Neniam mi renkontis tian stultulon, tian maldiligentulon, tian mallaboremulon, kia vi estas. Kian profesion vi volas havi, kiam vi estas plenaĝa ?

La studento : Mi volas esti profesoro, sinjoro.

Kio estas via V.-K. ?

Kompilas S-ro A. S. Beuker, Bijenhofstr. 34, Leeuwarden, Nederlando.

Divenu la ĝustajn en la signifoj ĉe la sekvantaj vortoj. Se vi ĝuste elektas ĉiujn, via Vort-Kvociendo estas 100. Tamen deprenu 10 por ĉiu miselekto aŭ nescio.

(Respondoj sur p. 185)

1. **Aplombo** : (a) seriozeco, (b) peza metalo, (c) granda memfido ?
2. **Sero** : (a) medikamenta likvo, (b) seninterrompa vico, (c) malfrivolemo ?
3. **Groteska** : (a) ridinde stranga, (b) grandioza, (c) simila al groto ?
4. **Aŭdaci** : (a) subaŭskulti, (b) maltimi, (c) diveni ?
5. **Emfazo** : (a) pli forta prononco, (b) malsano, (c) perioda ŝanĝo de aspekto ?
6. **Diakono** : (a) juvelŝtono, (b) grafika desegno, (c) kleriko ?
7. **Kliko** : (a) restaĵo, (b) dentforma intermetilo, (c) butono per kiu funkciigi aparaton ?
8. **Kleo** : (a) muzika signo, (b) floro, (c) marborda krutaĵo ?
9. **Libelo** : (a) birdo, (b) insekto, (c) insultparolo ?
10. **Morbilo** : (a) infekta febro, (b) hundo, (c) manĝebla fungo ?



ESPERANTO KAJ RADIO

Mallongigoj :

I=Informoj, P=Parolado, K=Kurso

Dimanĉo	18.00–18.15	Sofia. 39.11m. I. Radio Sofia, Bulgarujo.
Lundo	07.15–07.30	Stockholm. 19.80m., 49.46m. P.
	07.45–08.00	Lille. 235m. K. I. Esperanto, 94 rue de la Rochelle, Tourcoing, (Nord), Francujo.
	14.30–15.00	Rio de Janeiro. 375m., 30.71m. K. I. Radio Ministério da Educação e Saude, Rio de Janeiro, (DF) Brazilo.
	15.15–15.30	Stockholm. 19.80m., 27.83m. P. Sveriges Radio, Stockholm 7, Svedlando.
	22.15–22.20	Hilversum, 298m. I. (ĉiun duan lundon): V.A.R.A. Heuvellaan 33, Hilversum, Nederlando.
Mardo	01.15–01.30	Stockholm. 19.80m., 27.83m. P.
	11.55–12.00	Bern. 48.66m., 25.61m., 16.87m. P. D-ro Baur. SRG, Kurzwellendienst, Neuengasse 23, Bern.
	17.35–17.40	Bern. Kiel je 11.55, sed anst. 16.87m., sur 19.60m.
	23.30–23.45	Gvatemalo. 49m. I. La Voz de Centro América Guatemala Cd., C. Ameriko.
Merkredo	17.20–17.40	Roma. 25.40m., 31.35m. P. Radio Roma—Esperanto. Via Vitorio Veneto 56.
	21.35–21.40	Wien 513m., 25.46m., 48.74m. I. Radio Wien, Argentinierstr. 30a, Wien IV, Aŭstrujo.
Ĵaŭdo	08.30–08.45	Paris. 347m., 48.39m. K.
	11.55–12.00	Bern. Kiel marde. D-ro Privat.
	17.10–17.25	Wien. 203m., 25m., 30m., 41m., 48m. P. (ĉiun duan ĵaŭdon).
	17.35–17.40	Bern. Kiel marde. D-ro Privat.
Vendredo	17.20–17.40	Roma. Kiel merkrede.
Sabato	20.00–20.15	Sofia. 39.11m. I.
	22.15–22.20	Hilversum. 402m. P. K.R.O., Emmastraat 52, Hilversum, Nederlando.

Klarigo—En la tabelo la horoj de la dissendoj estas laŭ la horsistemo de Greenwich. Por Mez-Eŭropa tempo oni aldonu unu horon.

Unufoje ĉiun duan monaton la stacio NCRV, Schuttersweg 8, Hilversum, Ned. elsendas paroladon en Esperanto. La pasinta elsendo okazis vendredon I junion je 17.30-17.45 laŭ ondlongo 402m. Nepre skribu por plioftigi la programojn.

Senpaga ilustrita programo havebla ĉe la svisa stacio.

Ĉiujn informojn pri radio sendu al S-ro G. Larglantier, 29 Bd. Murat, PARIS 16, Francujo.

36-a Universala Kongreso de Esperanto

Internacia junular-kunveno

La Esperantista junularo en la urbo de la 36-a U.K., Munkeno, invitas al postkongresa internacia junular-kunveno. Kun la junaj partoprenantoj de la U.K. ni veturos post la kongreso en la Bavarajn Alpojn ĉ. 60 km. for de Munkeno. Tie, ĉe la alpa urbo Kochel, situas la plej bela junulgastejo en Germanujo. Ĝi estas la hejmo de la Esperantista junularo por unu semajno, de 11-a ĝis 17-a aŭg. 1951.

Ni petas vin subteni tiun grandskalan kunvenon kun ampleksa kaj interesa programo kun dancado, kantado, ekskursado kaj simile, sed kun seriozaj diskutoj pri aktualaj problemoj.

Inter la ekskursoj troviĝas tuttaga aŭtobusa veturo tra la regiono Garmisch-Oberammergau kaj


ekskurso sur monton Herzogstand. Inkluziva kotizo ĝis 1.VII.51 estas 43 gm. Post tio 48 gm. Ilustrita informfolio estas disponebla. Skribu tuj al: Internacia Junular-Kunveno, Engelbertstr. 7, München-Pasing, Germanujo.

Aliĝoj al la U.K.

Laŭ plej lasta sciigo aliĝis al la 36-a U.K. 1345 personoj el 32 landoj.


Veturrabatoj

Lastmomenta avizo: Ekzistas por la germanaj fervojlinioj feria bileto, kiu validas 2 monatojn, kun eblo interrompi la veturon kvinfoje; minimuma distanco 100 km., rabato 10-40%. De 1-a majo tiaj biletoj (Urlaubskarte) estas haveblaj en eksterlando ĉe vojaĝagentoj. Vojaĝontoj al Munkeno do nepre petu tiun rabaton, kiu multe helpos je la spezoj.



Urbdoma Korto, Konstanz

Meersburg



Antaŭkongreso en Konstanz

KIEL speco de antaŭkongreso servos la Internacia Ferio-Semajno kun perfektiga kurso en Konstanz de la 28 julio ĝis 4 aŭgusto 1951. Sur la bordo de la Konstanz-a lago (Bodensee) troviĝas rimedoj por ekskursoj ne nur en Germanujo, sed ankaŭ en Aŭstrujon kaj Svislandon pro la unika situo de la urbo.

En la alloga programo troviĝas Interkona Vespero, ekskursoj per pramo al la translaga vinurbo Meersburg kun gustumado de ties

famaj vinoj ; al Bregenz (Aŭstrujo) per ŝipo laŭlonge de la svisa lagbordo ; al Pfändermonto per ŝnurvagonaro ; al insulo Mainau (sveda posedaĵo) ; Distraĵoj kaj Germana Vespero.

Kiuj vizitis Konstanz okaze de la T.J.O.-kunveno certe memoras la belaĵojn de ĉi tiu unika centro. Varma bonveno atendas vin ! Skribu tuj por aliĝilo kaj ĉiuj informoj al : Internacia Ferio-Semajno (Esperanto), Grüngang 2, KONSTANZ, Germanujo, sed ne al Munkeno.

Bilderoj (daŭrigo)

laboro, kaj al s-roj Blokker kaj Mg. Kalma, prezidanto kaj sekretario de la Nederlanda Asocio, kiuj mirinde bone organizis la aranĝojn en Nederlando.

Ni esperu, ke la komune farita laboro kaj la multnombraj personaj kontaktoj alportos bonajn fruktojn por la movado.

Kio estas via V.-K. ?

Respondoj (vidu p. 182)

1. (c) **Aplombo** estas granda memfido.
2. (a) **Sero** estas medikamenta likvo.
3. (a) **Groteska** estas ridinde stranga.
4. (b) **Aŭdaci** signifas multimi.
5. (a) **Emfazo** estas pli forta prononco.
6. (c) **Diakono** estas kleriko.
7. (b) **Kliko** estas dentforma intermetilo.
8. (a) **Kleo** estas muzika signo
9. (b) **Libelo** estas insekto.
10. (a) **Morbilo** estas infekta febro.

Nia felietono :

La Alaska Stafeto

F. Omelka

VI. Leonard Seppala

NENIU alia povis entrepreni tiom danĝeran vojaĝon, kiom estis el Ruby al Unalaklik, ol Leonard Seppala. Kiel Gunnard Kasson ankaŭ li devenis de Finnlando. Jam de sia infanaĝo li vivis en malvarma klimato kaj tial alkutimiĝis al la malmilda Alasko multe pli frue ol miloj da aliaj enmigrintoj. Lia staturo estis alta, li estis maldika. Li havis blondajn, ondajn harojn kaj bluajn okulojn, el kiuj elradiis infana ludemo kaj fera volo.

Lia kunjugaĵo estis la plej bela en la tuta Ruby. La terkulturistoj en aliaj landoj fieras pri la belaj ĉevaloj. En Alasko la viroj fieras pri siaj hundoj. Precipe la gvidanta hundo Balto, kiu ricevis la nomon laŭ la Balta maro, ĉar Seppala volis havi daŭran kaj vivan rememorigon je sia malproksima patrujo, distingiĝis per belega kresko, forto, kuraĝo kaj inteligento. Ĝi ja ne saltis laŭ ordono super bastonon, nek prezentis diversajn figuretojn, nek "petis". Sed sufiĉis, se ĝia sinjoro diru al ĝi kelkajn vortojn kaj la hundo tuj komprenis, kion li postulas de ĝi.

De tempo al tempo okazis, ke aro da hundoj komencis interbatali. Unu signo de Seppala—kaj Balto troviĝis inter ili. Se la hundoj konkorde ĵetus sin kontraŭ ĝi, ili certe disŝirus ĝin. Sed estis preskaŭ mirinde, kiom la ĉeesto de la fortstatura luphundo efikis al ĉiuj. Sufiĉis, ke ĝi al unu aŭ du ribelantoj mordetu la orelon, ke ĝi mallonge boju, ke ĝi montru siajn dentojn kaj ĉirkaŭrigardu kiel reĝo—kaj jam estis trankvilo. La hundoj ekmurmuris kaj konfuzite retiriĝis en siajn budojn, aŭ ili komencis flati al Balto.

Komence Seppala veturis laŭ la fluo de Yukon. La vojo kondukis tra la arbaro, kiu iomete mildigis la akrecon de la ventego. Malgraŭ tio la kunjugaĵo iris nur tre malrapide antaŭen, ĉar ofte troviĝis sur la vojo elradikiĝinta arbo, kiun li devis ĉirkaŭveturi.

Matene li transveturis Yukon-on kaj baldaŭ atingis la ebenaĵon. Ĉi tie la danĝero kulminis. La ventego, nekatenita per la baro de la arbaro, ekfuriozis kvazaŭ freneza. La frosto plifortiĝis tiom, ke Seppala povis mezuri 60 C sub nulo. Kaj krom tio li veturis sur tia surfaco de la tero, ke ĉiu paŝo povus rezultigi teruran falon en la profundon.

Seppala konis tiajn marĉajn regionojn, kie nur la maldika surfaca tavolo estis frostiĝinta. Tia loko facile rompiĝus sub la pezo de unu hundo, tiom pli de la tuta kunjugaĵo ! Pro tio li veturis tre singarde, grandparte fidante la naturan instinkton de Balto.

Horo post horo pasis kaj la monotona regiono daŭris. La hundoj estis elĉerpitaj de laco kaj de malsato, ĉar sur la vasta ebenaĵo ne estis unu loketo ŝirmita kontraŭ la ventego, kie Seppala povis nutri la kunjugaĵon. Kiam li vidis, ke li vane atendas tian monteton, li decidiĝis pri mallonga ripozo en la malferma regiono. Li haltigis la kunjugaĵon kaj disdonis al la hundo la

frostiĝintajn fiŝojn. La hundoj avide ĵetis sin al ili. Pli frue, ol Seppala venis al Balto, la duopo ĉe la glitveturilo jam pretis por pli kaj postulis per mallonga murmuro aldonon. Seppala ĵetis al ili ankoraŭ kelkajn fiŝojn kaj karesis ilin per la mano. Samtempe li rigardis al la neĝo, kie videblis kelkaj rugaj makuloj. Li konsterniĝis. De kio ili devenis? En tiu momento unu hundo levis la piedon kaj Seppala ekvidis sange ŝirvunditan plandon. Kompato premis lian gorgon. Sed li tuj venkis ĝin. En Nome mortas infanoj. Ili atendas savon. Ne konvenas ĝemi kaj perdi tempon pro kelkaj ŝirvundoj.

Ankoraŭ unufoje li mankaresis la hundojn kaj li kliniĝis por preni la konduk-rimenojn.

La hundoj je la antaŭo rigardis al li. Kiam li kliniĝis, ili ŝajne supozis, ke li volas doni al ili novan porcion da viando. Ili rapide ariĝis ĉirkaŭ li. Ĉiu volis esti la unua.

Kaj en tiu momento okazis io neatendita.

Eksonis mallonga, seka krako. Seppala tuj divenis, kio okazis. Sed antaŭ ol li povis forsalti, la glacio sub li rompiĝis kaj Seppala kun la glitveturilo troviĝis en la marĉaĵo.

La timigitaj hundoj saltis sur la firman glacieron kaj volis forkuri. Sed Balto revenis per arka flankvojo por sia sinjoro.

“Antaŭen, Balto! Tiru!” kriis Seppala kaj klopodis suriri sur la firman glacieron, sed tio sub lia pezo ĉiam rompiĝis.

La saĝa hundo komprenis. Ĝi kuregis denove al sia gvida loko kaj streĉis ĉiujn fortojn. Tiamaniere la ceteraj hundoj estis devigataj kuntiri.

Feliĉe estis ke la kondukrimenoj estis faritaj el tre solida felo. Ili alie certe traŝiriĝus, ĉar la sledo kojnumiĝis kaj ne povis elgliti.

Fine Seppala sukcesis kuŝiĝi sur la glacieron. Li kliniĝis super la perfida marĉaĵo, levetis iom la glitotrabojn kaj—la sledo ekflugis sur la firma glacio.

“Balto, haltu!” kriis Seppala kaj li pene levis sin. Li ja havis peltan veston, kiu estis taŭgigita por tiaj akcidentoj, sed tamen kelkaj gutoj penetris sub ĝin ĝis la nuda korpo kaj nun senkompate malvarmiĝis.

La kunjungaĵo obee haltis. Seppala atingis la sledon kaj lia unua penso estis al la paketo da sero. La pelto, en kiu ĝi estis envolvita, estis surface malsekigita, sed la interno estis absolute seka. Trankviligita li sursaltis la sledon kaj la kunjungaĵo denove ekveturis.

La ventego furiozis senĉese. Seppala sentis, ke liaj kruroj komencas rigidiĝi. Tuj kiam li konsciiĝis pri tio, li saltis de sur la sledo kaj kuris apude. Tio iomete helpis. La sango en la vejnoj komencis cirkuli pli rapide kaj lia dorso eksentis agrablan varmon. Sed samtempe kun ĝi aperis tia laciĝo, ke li devis vole nevole sursalti la sledon.

Intertempe la regiono ekŝanĝiĝis. Anstataŭ la vastaj ebenaĵoj aperis montetoj. Unue malaltaj, sed ĉiam pli kaj pli altaj, ĝis ili ŝanĝiĝis al kontinuaj montarĉenoj.

Se la vojo tra la tundro estis danĝera, ĉi tie ĝi ne estis pli sekura, ĉar malantaŭ ĉiu monteto povis neatendite troviĝi perfida abismo.

Estis jam malfrua posttagmezo, kiam li traveturis longan valon. Ambaŭflanke etendiĝis alten grandegaj montegoj, sur kiuj estis videbla neniuj arbetaro. La ventego okulfrape malplifortiĝis, kaj tial la kunjungaĵo veturis pli rapide.

Subite eksonis obtuza bruego, kvazaŭ en la malproksimo ektondrus.

Seppala maltrankvile ĉirkaŭrigardis. Kiam lia rigardo trafis sur la deklivon, kiu etendiĝis je la dekstra flanko alteen, li ekkomprenis kaj paliĝis.

Lavango !

La grandegaj amasoj da neĝo, kiuj liberiĝis per la propra pezo, ruliĝis en la mallarĝan valon, kiun li traveturas !

Kien forkuri ? Per unu rigardo li konvinkiĝis, ke la lavango ruliĝas je tia larĝeco, ke ne estas eble saviĝi antaŭ ĝi.

Li rapide direktis sin al la kontraŭa deklivo. Li svingis la vipon kaj per laŭta ekkrio instigis la hundojn al pli rapida kuro. Sed ne estis necese fari tion. La bestoj antaŭsentis la danĝeron kaj streĉis ĉiujn fortojn por forkuri antaŭ la pereiga elemento.

Sed la lavango estis pli rapida.

Balto apenaŭ atingis la piedon de la kontraŭa deklivo, kiam tremis la tuta valo per barelsona bruego. La neĝamasoj ruliĝis en la valon kaj neatendite silentigis la ekkron de Seppala kaj angorplenan bojadon de liaj hundoj.

La stafeto estis entombigita !


(daŭrigota)



La belega, malnova urbdomo de Haarlem,
kie okazos akcepto de la T.J.O.-kunveno

Haarlem—urbo de la presarto kaj florkampoj

Kunvenloko de T.J.O.



DE 26 julio ĝis 2 aŭg. ĉijare okazos en Haarlem. Nederlando la 7-a Internacia Junularkunveno de la internacia organizaĵo Tutmonda Junular-Organizo. Pri tiu festo oni povas ricevi ĉiujn informojn de la T.J.O.-Centro en West-Graftdijk (N.H.), Nederl. Oni esperas grandiozan demonstracion de la valoro de la Lingvo Internacia sur la

tereno de la junularo kaj varma bonveno atendas ĉiujn. Cetere la kunvenloko provizas belegan kadron por tiu manifesto kaj konvenas diri kelkajn vortojn pri tute speciala flanko de la Haarlema vivo.


En tiu urbo troviĝas mondkonata entrepreno Joh. Enschede & Zonen, presistoj, kiu ludas gravan kaj eminentan rolon en la vivo de Nederlando. Ĝi presiĝas la poŝtmarkojn !

La ĉefurbo de la provinco Nord-Holando estas antaŭ ĉio la naskiĝloko de la presarto. Sur la granda placo oni povas admiri statuon de Lourens Jansz Costers. Laŭ la nederlandanoj li estis la eltrovinto de la presarto, kaj tiu popolo ne akceptas la pretendon de la germanoj pri Gutenberg. Estu kiel ajn, estas certe,

ke en Haarlem oni presis per litertipoj jam en 1450, kaj inter la nunaj entreprenoj la supre nomita firmo estas la plej malnova. En sia privata gazeto kiu aperis kontinue dum 296 jaroj, oni presigis antaŭ la milito artikolon sub la titolo *La plej nova lingvo en la plej malnova gazeto*. Temis pri Esperanto-rubriko, kompreneble. La nomita entrepreno presigas poŝtmarkojn kaj papermonon ne nur por enlanda konsumo, sed ankaŭ por eksporto kaj uzado en aliaj landoj. Dum la milito tiu firmo havis la privilegion (!) presigi la nutraĵkuponojn por la nederlanda popolo. En tiu malfacila tempo tiuj objektoj fariĝis kvazaŭ mono kaj havis sian specialan kurzon ! Per ili oni povis akiri tion, kion mono ne povis peri !

Por la specialaj presaĵoj produktataj en ĉi tiu entrepreno oni disponas pri tute specialaj rimedoj. Krom la ordinaraj presiloj por "alt-presado" kaj "ofseto" k.s. oni havas maŝinojn kapablajn reprodukti la aspekton de mangravurado. Tiuj maŝinoj cetere estas tiel altkostaj, ke ne valoras pensi pri akiro por falsigo de papermono ! Ekzistas en la tuta mondo nur malmultaj tiaj maŝinoj. Per iuj el tiuj maŝinoj oni kapablas gravuri kaj produkti, kion la francoj nomas *guilloché*, delikatajn desegnojn el belaj figuroj kaj interplektitaj linioj.

Kompreneble pro la fakto, ke oni ĉi tie fabrikas monbiletojn kaj poŝtmarkojn de pluraj landoj, multo estas treege sekreta, kaj la bonŝanca vizit-



Karakteriza interno de malnovtipa nederlanda hejmo

anto, kiu sukcesas akiri vizit-permeson, nepre ne atendu, ke oni regalos lin per specimenoj de la produktaĵoj ! Efektive ekzistas en la entrepreno severa kaj rigora sistemo de kontrolo. Ĉiu peco de papero estas registrata kaj pri ĝia dispono devas troviĝi kontentiga kvitigo. Tage kaj nokte deĵoras privataj gardistoj de la entrepreno.

Inter la proks. 900 dungitoj troviĝas pluraj, kiuj laboris en la entrepreno pli ol 50 jarojn, kaj ĉiuj jubileoĵoj estas grandskale festataj. La firmo posedas propran muzeon kie troviĝas admirindaj belaĵoj kaj antikvaĵoj en la presarto.

(Kompilita kun kunlaboro de G. J. B. Bontje, kaj T. J. O. al kiu lasta ni direktas koran dankon pro prunto de la patricoj ilustrantaj la artikolon.—Red.)

Specialaj Poŝtmarkoj pri la Festo de Britujo

Al alilandaj pm.-kolektantoj mi sendos ĉi tiujn belajn poŝtmarkojn neuzitajn el Anglujo kontraŭ paĝo :

Por la tuta serio (6 markoj de £1, 10ŝil., 5ŝil., 2½ŝil., 4p., 2½p.)
42 ŝil. angl. (aŭ 2 serioj por £4)

Por 4 valoroj (2½p.—5ŝil.) 11ŝil.

Por 3 „ (2½p.—2½ŝil.) 4ŝil.

Por 2 „ (2½p.—4p.) 1ŝil.

(aŭ po 3 internaciaj respond-kuponoj por unu angla ŝilingo).

Mendu ĉe : J. C. Taylor, The Beeches, Whitegate, Northwich, Cheshire, Anglujo.

UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO

Centra Oficejo : Heronsgate, Rickmansworth, Herts., Anglujo

OFICIALA INFORMILO

N-ro 238

3-an de Majo 1951

STATISTIKO. Jen la stato de la membraro je la fino de Aprilo, kaj ankaŭ, por komparo, je la sama dato en 1950 :

	1950	1951
Asociaj membroj	4702	3839
Individuaj membroj :		
MJ 633		687
MA 3678		4063
MS 261		268
Patronoj .. 14		16
DM 198		212
HM 56		58
	4840	5304
	9542	9143

DELEGITOJ

Aŭstralio

Melbourne. D : K. G. Linton, 11 Poplar St., South Caulfield, S.E.8 Tel : MU 7250.

Brazilo

Ribeirão Preto. D : B. Silva, 1a Secção dos Correios e Telégrafos.

Britujo

Ashton-under-Lyne. D : F-ino J. Lindsay, 4 Brookfield Grove.

Herne Bay (Kent). D : S-ino M. J. Perry, 54 The Downs. Tel : 1165.

London. VD : E. 12 : S. Drake, 28 Dover Road, Wanstead, E.12. Tel : Albert Dock 2378 (dumtage).

Pontypridd. D : vakas pro morto.

Robin Hood's Bay (Yorks.) D : F-ino E. G. Spark, Harboro, Thorpe Lane.

Finnlando

Luvia. FD (Flegado) : S-ino Kerttu Kivinen. Tel : 138.

Francujo

St. Etienne (Loire). FD (Lingvoj) : H. Amblard, 2 Place Louis Courier. Tel : 79/48.

Hispanujo

Sabadell. D : J. Viladoms Valls, C. Ribot i Serra 135. Tel : 1004.

Nederlando

Soestdijk. D : vakas.

Portugalujo

Lisboa. FD (Presado) : A. P. da Costa Junior, Rua General Taborda 65, 2, esq. Tel : 61131.

Svedujo

Kumla. VD : B. Söderlund, Skottvallavägen 24. Tel : 71152.

FD (Kristanismo) : F-ino K. Larsson, Sveavägen 11.

Leksand. D : L. Persson, Box 149, Häradsbygden.

Norrgarda. D : vakas pro morto.

Tungelsta. FD (Roz- kaj krizantem-kulturo) : vakas pro morto.

Usono

Piney Flats. D : vakas.

NOVA DUMVIVA MEMBRO

Atherton, S-ino L., Manchester, Anglujo

MEMBRO-SUBTENANTOJ 1951

253. Lloyd, J. C., Salford, Anglujo

254. Almén, P., Hällefors, Svedujo

255. Kovarik, F. J., Chicago, Ill., Usono

256. Richardson, D-ro R. H., Beloit, Wis., Usono

257. Vigelis, S-ino A. J., Long Beach, Cal., Usono

258. Dillinger, H. E., Placerville, Cal., Usono

259. Aproso, E., Torino, Italujo

260. Blid, A., Nynäshamn, Svedujo

261. Szabad, S., Stockholm, Svedujo

262. Carlson, F., Seattle, Wash., Usono

263. d'Oliveira Antunes, J., Rio de Janeiro, Brazilo

264. Oliveira Cunha, J. B., Rio de Janeiro, Brazilo

265. Gaio, M. J., Rio de Janeiro, Brazilo

266. Vincent, F-ino J., Lourdes, Francujo

267. Borgions, F-ino B., Hasselt, Belgujo

268. Mazzantini, D-ro R., Savona, Italujo

269. Ujdur, S. M., Henderson, Novzelando

DONACOJ. P. L. Gill 20ŝ., E. J. Williams, 7ŝ. 6p., F-ino A. Wolfe 2ŝ. 6p., J. C. Hall 2ŝ. 6p., C. McInnes 2ŝ. 6p., H. C. Allen 2ŝ. 6p., G. Delanoue 9ŝ., R. Porter 10ŝ.

Sinceran dankon al ĉiu helpanto

Peto al delegitoj. En la jarlibro 1952 ni intencas fari indikon se estas grupo en urbo. Plena informo ne povos aperi, parte pro manko de spaco kaj parte ĉar detaloj pri kunvenoj ofte ŝanĝiĝas, sed ni indikos ke oni petu ĝisdatan informon de la loka delegito. Se estas grupo en via urbo kiu *regule* kunvenas, bonvolu sendi al ni (tiel ke ni ricevu la informon antaŭ la fino de Oktobro) simplan sciigon pri tio sur poŝtkarto.

Rolo de Ĉefdelegito. Ni volas atentigi al uzantoj de la Delegito Servo, ke la Ĉefdelegito kutime ne plenumas la servojn de ordinara delegito. Tial ke la Ĉefdelegito estas tre okupita homo, bonvolu ne adresi al li petojn, kiuj efektive estas en la kompetento de delegito.

C. C. GOLDSMITH, *Sekretario.*

Esperantista Vivo

Geedziĝo

Ashby—Laudyn-Chrzanowski, F-ino E. A. Ashby, Del. de U.E.A. en Newquay, Anglujo, kun S-ro Adam Laudyn-Chrzanowski, 11 aprilo 1951.

v. Steenwijk-Lundkvist. F-ino M. v. Steenwijk en Rotterdam kun S-ro A. Lundkvist, Del. de U.E.A. en Karlskrona, Svedlando, 1 Majo 1951.

Sincerajn gratulojn !

Niaj mortintoj

Ni eksciis pri la forpaso de la jenaj samideanoj al kies parencoj ni volas esprimi nian profundan kondolencon.—Red.

Reganatti, S-ro José, 16 aprilo en São Paulo, Brazilo. Vigla propagandisto.

Santler, S-ro Franz, 6 aprilo 1951 en Knittelfeld, Aŭstrujo, 71-jara. Pioniro en sia loko.

Wolmer, S-ro Gideon, 10 aprilo 1951 en Tungalsta, Svedlando, 70-jara. FD de U.E.A. kaj fervora samideano.

Korekto : En la februara n-ro staras (p. 35 sub *Britujo*) : “. . . je iniciato de S-ro P. L. Wright . . . multa propagando estas farita.” Bonvolu legi : “. . . je iniciato de Universala Ligo . . . ”

Internacia Konkurso

1951

KIEL ni indikis en la lastmonata komento pri la ciferoj en la konkurso, la situacio fariĝas interesa. Nur kelkaj procentoj dividas la unualokajn konkurantojn kaj en la nuna momento iu ajn el deko da landoj povus subite okupi la supran lokon.

Ni volas gratuli al la norvega asocio pro tio, ke ĝi aranĝis enlandan konkurson inter siaj grupoj similan al ĉi tiu internacia. Tia konkurso estas imitinda kaj certe devus havi konkretajn rezultojn por la bono de la movado entute.

	Lando	Kvoto	Poentoj	%
1.	Finnlando ..	2000	2535	126.7
2.	Germanujo ..	2400	2930	122.1
3.	Brazilo ..	2500	3005	120.0
4.	Italujo ..	1700	1995	117.3
5.	Portugalujo ..	600	675	112.5
6.	Japanujo ..	800	875	109.4
7.	Maroko ..	400	425	106.2
8.	Urugvajo ..	250	255	102.0
9.	Belgujo ..	2100	2115	100.7
10.	Sudafriko ..	250	245	98.0
11.	Izraelo ..	300	290	96.6
12.	Svislando ..	1400	1340	95.7
13.	Britujo ..	12000	11259	93.8
14.	Danlando ..	2800	2605	93.0
15.	Hispanujo ..	1100	985	89.5
16.	Aŭstralio ..	900	775	86.4
17.	Francujo ..	5700	4903	86.0
18.	Kanado ..	250	195	78.0
19.	Nederlando ..	5000	3715	74.3
20.	Norvegujo ..	1400	1030	73.6
21.	Svedlando ..	5300	3665	69.1
22.	Argentino ..	800	550	68.7
23.	Usono ..	3000	2017	67.2
24.	Novzelando ..	800	530	66.2
25.	Irlando ..	250	165	66.0
26.	Kubo ..	250	125	50.0
27.	Aŭstrujo ..	1000	470	47.0
28.	Islando ..	500	55	11.0

ANONCETOJ

Kosto : du pencoj por ĉiu vorto, aŭ internacia respondkuponon por ĉiu duo da vortoj.

Ĉiu anoncanto morale devigas sin respondi minimume unu fojon al ĉiu kiu skribas.

Anonceto por iu numero devas atingi nin antaŭ la 6-a de la antaŭa monato.

Antonio Frijters, Dijkplein 6, Breda, Nederlando, deziras interŝanĝi leterojn kaj poŝtkartojn kun tuta mondo pri ĉiuj temoj, precipe pri radio.

Essen, la koro de la germana karbminea regiono, invitas la tutan mondon korespondi reciproke kaj viziti ĝin. Tranokteblecoj laŭplaĉe en malmultekostaj aŭ luksaj hoteloj aŭ ĉe samideanoj. Vizitservo konigos la mirindan ĉirkaŭaĵon. Skribu al D-ro Wegener, Hollestr. 1, Essen, Germanujo.

26-jara fraŭlo tre deziras priaŭdi psikajn spertadojn, verajn sonĝojn, antaŭscion psikan, k.t.p. Se vi spertis ĉi tiujn bonvolu skribi. Ankaŭ deziras korespondi kun samideaninoj tutmonde. Skribu al F. Bradford, 48 Badenhams Grove, Lawrence Weston, Bristol, Anglujo.

AAAAAAAAAlt! Legu Jarlibron pĝ. 55.

Sociedade Cultural de Angola (Adr. C.P. 535, Luanda, Angola, Portugala Okcidenta Afriko) : Ĝiaj membroj, advokatoj, inĝenieroj, kuracistoj, k.t.p. bezonas konstati la amplekson de nia movado por starigi Esperantan kurson. Tre favora atmosfero. Skribu al ĝi esperantlingve.

Turisma Servo : Rezervas malmultekoste hotelĉambrojn en okcident-Eŭropo, prizorgas gvidadon, turismajn prospektojn (afranku filatele). Loeckx, Konijnenperken 109, Brussel-Bosvoorde, Belgujo.

Itala doktoro, 35-jara, korespondos kun kleraj junuloj kaj junulinoj, precipe finnlandaj, skandinaviaj, hispanaj, portugalaj, kubanaj, malproksimorientaj, centra-sudafrikaj. Raffaello Mazzantini, Via Nazario Sauro 1, Savona, Italujo.

Ne-katolikoj, kiuj deziras informojn pri la katolika religio povas ricevi ilin senpage de la Internacia Katolika Informejo, Sekretario, Fraterhuis, Loonopzand, Nederlando.

Gesamideanoj. Sendu 6 respondkuponojn kaj vi ricevos Parizon per 12 mirindaj fotografaĵoj (Eiffel Turo, katedralo, k.t.p.) Skribu al S-ino A. Collet, 1 rue du Filoir, Etampes (S. & O.), Francujo. Nepre respondos.

Anglujo. Malgranda gastejo fronte kontraŭ maro. Apud Dover. Esperanto parolata. S-ino Perry, 54, The Downs, Herne Bay, Kent.

Sekretaj Sonetoj : Por lingvaj kaj literaturaj laboroj en Esperanto estas serĉata ĉi tiu verko. Skribu kun prezindiko al S-ro J. Régulo Pérez, La Laguna (Tenerife), Kanariaj Insuloj.

25-jara fraŭlo (lernanto) deziras korespondi kun fraŭlinoj tutmonde. Skribu al BM/KYHN, London, W.C.1, Anglujo.

Mi serĉas Esperanto-gazetojn, volantajn publikigi mian verkon "Fak-Vortaro", eĉ se mi devos iom pagi. Verko donanta plej grandan konon de Esperanto en malplejaj paĝoj (32), pro siaj difinoj aŭtomataj, aŭ implicaj en klasig-situo de ĉiu vorto (helpe de similo inter kungrupigitaj). Ĉiuj vortoj estas implice numeritaj per literoj kunlegeblaj (lok-montriloj), donantaj formulon por ne hazarda evoluo de Esperanto, kaj por aldoni al interkompreno plej vasta, interkomprenon plej perfektan; kaj por ligi al esprimoj popolaj, esprimojn sciencajn. Ĉiu fako estas, pro sia kadro-formo, kiel mapo en geografio, kaj havas du paĝojn kunvideblajn, el 32 linioj (kvarope dismetitaj). Ĉiu linio havas 4 vortojn similajn. Ankaŭ enestas aldono pri blindulskribo simpligita (Brajso), kaj racio-skribo (ambaŭ kunligitaj). D-ro Gandi (Antonio Santamarina), Profesoro en Internacia Instituto de Simpligo; kolektanto de ideoj feliĉaj; dumviva membro de U.E.A.; aŭtoro de *Plano del Idioma*. Adreso: Str. Ruiz Palacios 13, (Chamartin), Madrid, Hispanujo.

Petu senpagan personan sciencan horoskopon sendante vian naskiĝdaton (lokon kaj horon), foton kaj tri respondkuponojn al R. Melo, Verseau Instituto, Meylieu-Montrond (Loire), Francujo.


32 junaj fraŭlinoj kaj 20 liceanoj deziras korespondadi letere aŭ poŝtkarte kun samaĝaj samideanoj tutmondaj. Skribu al kursestro: Daniel Luez, Lycée, Laon (Aisne), Francujo.

Du belgaj oficistoj deziras korespondi precipe kun amerikaj, oceaniaj, kaj skandinavaj landoj. Nepre respondos. Skribu al S-ro Félix Carlier, rue Rosée 33, Rongy (Hainaut), Belgujo, kiu transdonos.

12 gelernintoj korespondus tutmonde. Baudat, 20 Route de Lyon, Moulins (Allier), Francujo.



flugu per BEA



al

MUNKENO



Eniru BEA-aviadilon de Londono en kiu ajn mateno de la semajno je 09.40—kaj vi estos en Munkeno nur 6 $\frac{1}{4}$ horojn poste. Flugado per BEA estas la plej rapida kaj plej komforta vojo ĉirkaŭ Eŭropo :—Amsterdamo, Berlino, Bruselo, Kopenhago, Londono, Madrido, Oslo, Parizo, estas kelkaj el la grandaj ĉefurboj servataj de oftaj kaj regulaj BEA-servoj. Por ĉiaj informoj kaj rezervoj, vin turnu al Ĉefaj Vojaĝagentoj aŭ BEA-oficejoj

B R I T I S H E U R O P E A N A I R W A Y S